87/3. 16.- F

HUNGARA VIVO



Komuna Entrepreno de Ekstera Komerco

por Kosmetikajoj kaj Dommastrumaj Kemiajoj

1113 BUDAPEST Bocskai út 90. Hungario
Telekso: 022-4333 Telefono: 0036-1-666-622

viro kaj virin' en ĉiu aĝo
gesinjoroj, kies agojn direktas saĝo
vian domon faros pura, vian korpon sorĉos bela
vian sanon tenos bona kaj perfekta kaj modela...

CAOLA

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség nyomdájában. Felelős vezető: Varjassy Ágnes, Munkaszám: 87-0042. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben és a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V., József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft, fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft.

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Inde al la Jubileo	82
Esperanto – centjaro serve al la homa kulturo	86
La mondo en eta guto	89
Esperanto tamen progresas	92
Abonyi-Nagy, Á.: János Szabó (1897-1987)	93
Karinthy, Fr.: Mi instruas mian fileton (T.Bessenyei)	94
84 jara Dumviva Membro de HEA	95
Felső, P.: Hungario – ne plu Futbolio	97
Panoramo	100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj	103
Unu poemo en du tradukoj	104
Glatz, F.: Vojoj novaj kaj malnovaj 2.	105
Csiszár, E.: Superrigarde al hejma Esperanto	108
Laczó, L.: La graveco de la fridigo (E.Fenyvesi)	112
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo	118
Krucenigmo, Ekzameno sen risko	119
Leterkesto, Korespondi deziras	120

Sur la frontpaĝo: D-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de HEA festparolas en la Parlamentejo dum la inaŭguro de la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso (Foto de Z. *Fejér*)

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
I. Szentháromság tér 1-3.
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVIIa jaro 1987 n-ro 3
(133)

MESz nyomda 87-0042

Inde startis...

la Jubilea Jaro en Hungario: la raportoj pri tiu starto merite okupas dekon da paĝoj en tiu ĉi numero. La indecon de tiu starto cetere bele montras jam nia frontpaĝo: la solenecon de la eventoj de la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso impone bazis la inaŭguro en la pompa salono de la hungara Parlamentejo. La raportoj pri la ceteraj kongresaj eventoj kaj la festparolado de la prezidanto de HEA klare atestas pri tio, ke la hungaraj esperantistoj prenas serioze la Jubilean Jaron, kaj faras ĉion fareblan por popularigi Esperanton en kiel eble plej vastaj rondoj. Ni esperas, ke simile oni faras ankaŭ en aliaj landoj, ja Esperanto estas afero internacia, kaj progresoj en nur unu lando en si mem utilas por nenio. Tiu komuna agado estis la celo de la 20a Konsultiĝo de Esperanto-Asocioj en Socialismaj Landoj, pri kiu kunveno same aperas raporto en tiu ĉi numero.

El la ceteraj kontribuaĵoj meritas apartan atenton la artikolo de Ernő Csiszár *pri la hejma uzado de Esperanto. Li prave emfazas, ke Esperanto ne povas eviti la hejman sferon, ja sen ĝi la lingvo restus kiel birdo kun nur unu flugilo. Feliĉe multaj esperantistoj konscias pri tio, sed ĝis nun, bedaŭrinde, la movado ĝenerale donis malmultan atenton al la tiuterena agado. Per la aperigo de tiu ĉi artikolo ni esperas iom popularigi la hejman uzadon de la Internacia Lingvo.*

En tiu ĉi numero aperas la dua kaj fina parto de la artikolo de Ferenc Glatz: *„Vojoj novaj kaj malnovaj". Ni tre volonte ricevus la opinion de niaj legantoj pri tiu ĉi superrigardo pri la lastaj kvardek jaroj de la socialisma evoluo.*

Pál Felső, *redaktoro de la Esperanto-dissendoj de la Hungara Radio en sia artikolo „Hungario – ne plu Futbolio" ŝajne skribas pri sporto, sed fakte li analizas tute specifajn sociajn fenomenojn.*

Pro spacomanko la literaturon reprezentas en tiu ĉi numero nur humura novelo de Frigyes Karinthy, *naskiĝinta antaŭ cent jaroj, kaj poemo de Miklós* Radnóti *– en du tradukoj. La tradukintoj volonte ricevus la opinion de la legantoj: kiu el la du tradukoj plaĉis pli?*

Kaj fine unu demando: ĉu Vi rimarkas, ke HV aperas jam sen malfruo?

Inde al la Jubileo

Marto en la hungara ĉefurbo – tio devas esti Budapeŝta Printempa Festivalo, kun la jam tradicia renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Tiu ĝemeliĝo de konceptoj povas esti prava, tamen ĉijare marto en Budapeŝto alportis ne nur teatrajn eventojn, sed ankaŭ imponan starton de la Jubilea Jaro en Hungario.

La unua evento estis gazetara konferenco, kiu okazis la 9an de marto en la sidejo de la Asocio de Hungaraj Ĵurnalistoj. En tiu konferenco d-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, kaj aliaj gvidantoj de HEA konigis al ĉ. 30 ĵurnalistoj la aktualan situacion de la hungara kaj internacia Esperanto-movado, kaj informis ilin pri la plano de aranĝoj por la Jubilea Jaro. La gazetaro abunde informis pri la konferenco, kiun ĉeestis ankaŭ la kamerao de la multe spektata vespera televidĵurnalo.

La ĉefa programo de la monato estis la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, kiu okazis en la signo de la centjariĝo de la Internacia Lingvo. Ĝia inaŭguro verŝajne estos longe neforgesebla memorajo por tiuj ĉ. 600 personoj kiuj ĉeestis ĝin en la impona salono de la iama supera

Kelkaj el la partoprenantoj de la gazetara konferenco

La packunveno en la parlamentejo: parolas Sándor Jakab





La ordeno „Paco kaj Amikeco"

ĉambro en la Parlamentejo. (Vidu la frontpaĝan koloran foton.) La fakto, ke esperantistoj povis kunveni en tiu prestiĝa konstruajo, elokvente pruvas la altan socian rekonon, kiun Esperanto ĝuas en Hungario.

La inaŭguran kunvenon malfermis d-ro László Deme, tutlande konata elstara lingvisto, honora prezidanto de HEA. Festparolis d-ro Vilmos Sághy: la tekston de lia parolado ni publikigas sur la sekvaj paĝoj. Poste petis vorton Tibor Baranyai, ĝenerala sekretario de la Nacia Konsilio de Hungaraj Sindikatoj. Li salutis la Kongreson, kaj nome de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko okaze de la jubileo transdonis al Hungara Esperanto-Asocio la altan ordenon „Paco kaj

Al la Estraro de Hungara Esperanto-Asocio
Al la manoj de kamarado prezidanto D-ro Vilmos Sághy

Budapest VIII.
Kenyérmező u.6.

Estimata Estraro!

En la nomo de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio kaj ankaŭ persone mi salutas Hungaran Esperanto-Asocion kaj ĉiujn partoprenantojn de via kongreso festanta la centjariĝon de la Esperanto-movado.

La ekesto de la lingvo Esperanto kaj la movado mem dekomence reprezentas noblajn homamajn strebadojn: helpi la interpopolan proksimiĝon, la pli bonan interkompreniĝon kaj la pli altan reciprokan estimon. La disvastiĝo de Esperanto en la pasintaj cent jaroj pruvis la ĝustecon de viaj movadaj celoj.

Al la disvastiĝo de Esperanto en Hungario grave konstribuis, ke la laborista movado frue rekonis la rolon de la lingvo en la klerigo de la laboristaro. Por multaj hungaraj laboristoj pere de Esperanto malfermmiĝis fenestro al la mondo. Inter la hungaraj esperantistoj ĉeestis tiaj elstaraj personecoj de la laborista movado kiel Aurél Stromfeld, Katarina Hámán, György Kilián, Gyula Kulich, Flóra Martos, István Kossa, Borbála Szerémi.

Dum la jardekoj post la liberiĝo, la aktivado de Hungara Esperanto-Asocio vaste disvolviĝis kaj kontribuis al la altigo de la monda prestiĝo de nia patrujo. Estas alte taksebla ankaŭ tiu misio, kiun la asocio plenumas en la diskonigo de la hungara kulturo.

Nun ni vivas en epoko, kiam la servado al ĉiuj ĉi celoj fariĝis pli grava ol iam ajn antaŭe. Ankaŭ via humanisma movado kontribuis al tio, ke la espero, esprimita eĉ de la nomo de la lingvo, fariĝu realo koncerne la pacan estontecon de la homaro, la pacajn interŝtatajn kontaktojn.

Pensante pri ĉio ĉi mi elkore gratulas pro la alta, distingo, donacita de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko pro viaj ĝisnunaj rezultoj, kaj mi deziras multe da sukcesoj en la realigo de viaj noblaj celoj.

Kun koraj salutoj

János Kádár

ĝenerala sekretario de la
Hungara Socialisma Laborista Partio



La prezidanta profesoro László Deme transprenas la distingon „Pro Esperanto"

Amikeco". (Estas menciinde, ke en Hungario ne estas kutimo distingi organizaĵojn.) Poste li laŭtlegis la leteron de János Kádár, senditan al la Estraro de HEA, en kiu la ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio gratulas la movadon pro la centjariĝo kaj pro la alta ŝtata distingo. Estas rimarkinde, ke János Kádár jam la trian fojon sendas salutan leteron al la esperantistoj – la antaŭaj du salutoj estis direktitaj al nia revuo, en 1961, respektive en 1985.

La sekva punkto de la tagordo estis transdono de distingoj al meritplenaj esperantistoj: parto de tiuj distingoj estis ŝtataj, parton de ili donacis diversaj gravaj sociaj organizaĵoj, kaj kompreneble ankaŭ HEA mem donacis distingojn al siaj elstaraj aktivuloj.

Post la transdono de la distingoj sekvis la salutvortoj de d-ro Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA. Ŝi substrekis, ke Universala Esperanto-Asocio tre alte taksas la agadon kaj sukcesojn de la hungaraj esperantistoj.



D-ro Vilmos Sághy (dekstre) transdonas la prenas la distingon „Pro Esperanto" al István Nemere

Post tio la inaŭguro daŭris kiel packunveno: en ĝi festparolis Sándor Jakab, membro de la Hungara Nacia Packonsilio.

Pri la inaŭguro de la Kongreso informis la samtaga televida ĵurnalo, kaj ĉiuj sekvatagaj tutlandaj tagĵurnaloj. Estas notinde, ke ĉiuj ĵurnaloj aperigis la plenan tekston de la Kádár-letero.



Ĉe la Nacia Biblioteko „Széchényi" multaj vizitis la ekspozicion „La Esperanta Libro en Hungario" (Fotoj de Z. Fejér)

La 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso post la inaŭguro en la Parlamentejo, la 21an kaj 22an de marto daŭrigis sian laboron en la kulturdomo „Láng". Enkadre de la Kongreso okazis multaj sekciaj kunvenoj, en kiuj la esperantistaj aktivuloj pridiskutis la aktualajn farendaĵojn sur sia propra agadkampo. Enkadre de la Kongreso kunsidis la jarkunveno de HEA, kiu akceptis interalie novan statuton.

Grava kultura evento de la „Esperanta marto" apud la teatraj prezentadoj estis impona ekspozicio en la tri ekspoziciaj salonoj de la Hungara Nacia Biblioteko „Széchényi". La ekspozicio havis la titolon „La Esperanta libro en Hungario", kaj ĝin kompreneble kunmetis la senlaca Károly Fajszi el sia riĉega kolekto. La Nacia Biblioteko eldonis la katalogon de la ekspoziciita materialo, tiel ĉiuj vizitantoj povis informiĝi ankaŭ pri detaloj koncerne la librojn. La ekspozicio estis malfermita inter la 16a de marto kaj 11a de aprilo.

Okaze de la Kongreso aperis maldika, sed tre grava hungarlingva libro en la eldono de HEA. Temas pri la kolekto de la priesperantaj artikoloj de Géza Bárczi (1894-1975), la plej elstara figuro de la ĉi-jarcenta hungara lingvoscienco. Bárczi mem estis esperantisto, kaj tiel la kolekto de liaj artikoloj estas la plej eminenta propagandilo en intelektulaj rondoj.

Alia hungarlingva libro, kiun eldonis HEA, estas kvazaŭ la „daŭrigo" de la pasintjare furorinta „Libro de sekretoj", sub la titolo *„Libro de novaj sekretoj"*. Ĝi aperis en 150.000 ekzempleroj (en lando kun 10 milionoj da enloĝantoj!), kaj ĝi alportos signifan financan profiton por HEA; krom tio ĝi kontribuas ankaŭ al la propagando de Esperanto, ĉar aperas en ĝi tri artikoloj, kiuj ligiĝas al la Internacia Lingvo: pri persekutoj kontraŭ Esperanto, pri aliaj planlingvoj, kiuj estas „senesperaj konkurantoj" de Esperanto, kaj pri Sándor Szathmári, krome librofine reklamo pri koresponda kurso de Esperanto, kaj alvoko fariĝi subtena membro de HEA.

Resume: la Jubilea Jaro startis en Hungario rezultoplene. La „Esperantan marton" sekvis „Esperanta aprilo", kiam HEA okupis sian novan sidejon en elita medio, en la historia kvartalo de Budapeŝto – pri tio ni informos pli detale en la sekva numero.

Distingitaj esperantistoj

Okaze de la centjariĝo de Esperanto, dum la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso meritplenaj esperantistoj povis transpreni diversajn distingojn.

Károly *Fajszi* ricevis la **Oran Gradon de la Ordeno de la Laboro**, d-ro Ottó *Haszpra* la **Arĝentan Gradon de la Ordeno de la Laboro**. La distingo **„Pro Socialisma Kulturo"** estis transdonita al Ada *Csiszár*, Mihály *Gergely* kaj al d-ro Árpád *Rátkai*. Mária *Busai* ricevis la distingon **„Pro Elstara Laboro"**, d-ro Péter *Broczkó*, István *Gulyás* kaj d-ro Flóra *Szabó-Felső* la **Oran Gradon de la Distinga Insigno „Pro sindikata Laboro"**. S-ino Károlyné *Ködmön* kaj Sándor *Jakab* povis transpreni la **Distingan Insignon de la Pacmovado,** Barnabás *Batta*, d-ro Imre *Ferenczy*, d-ro Lajos *Molnár*, d-ro József *Németh*, László *Vörös* kaj la *Esperanto-Komitato en la Departemento Somogy* la **Memordiplomon de la Pacmovado.**

La distingo **„Pro Esperanto"** estis transdonita al d-ro János *Balázs*, d-ro László *Deme*, d-ro Ferenc *Jáki*, István *Nemere* kaj László *Tiszai*.

La **Honorinsignon de HEA** ricevis la sekvaj esperantistoj: Zsuzsa *Barcsay*, Erika *Bardocz*, Zsófia *Baross-Kóródy*, Zsuzsa *Csiszár*, Lajos *Domokos*, d-ro Endre *Dudich*, István *Fekete*, d-ro Pál *Felső*, Sándor *Hideg*, Ferenc *Kapcsándi*, Oldřich *Knichal*, Márta *Kovács*, Ernő *Köncöl*, d-ro Béla *Mészáros*, János *Patay*, Ferenc *Phersy* (pli juna), Kálmán *Szabó*, Imre *Szenes*, d-ro Zsuzsa *Varga-Haszonits*, d-ro Balázs *Wacha*, Marianna *Zöld-Khek*.

Nia Redakcio sincere kaj elkore gratulas al ĉiuj distingitoj.

Esperanto-centjaro serve al la homa kulturo

Festa parolado de d-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio en la Inaŭguro de la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, okazinta la 20an de marto en la Parlamentejo

Karaj Gekamaradoj!
Estimata Festa Publiko!

Ni festas la centan datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, kaj samtempe ni malfermas la 28an Kongreson de la hungaraj esperantistoj.

La solenecon de nia festo altigas la fakto, ke ni povas okazigi ĝin ĉi tie, en la Parlamentejo, kiu estas la simbolo de la konstitucieco kaj publika vivo por ĉiuj civitanoj de nia lando. En la sama konstruaĵo ankaŭ nun daŭras la printempa kunsido de la Parlamento, la plej supera ŝtatpotenca organo de nia lando, kaj ni povas kvitanci kiel socian rekonon al nia movado tiun fakton, ke krom la ĉeestantaj altrangaj reprezentantoj de ŝtataj instancoj kaj sociaj organizaĵoj ni povas saluti ĉi tie ankaŭ plurajn parlamentanojn.

La kreiĝo de la Internacia Lingvo havas striktan interrilaton kun la abrupta kresko de la produktofortoj. La naciaj kadroj montriĝis ĉiam pli malvastaj por tiuj produktofortoj. En la dua duono de la pasinta jarcento la ampleksoj de la monda komerco plurobliĝis. La invento de la vaporma§ino, ties uzo por ŝipa transporto, la konstruado de fervojlinioj estis samtempe la kaŭzoj kaj naturaj akompanantoj de la evoluo. Dum tiu ĉi evoluo signifis kreskantan problemon la lingva komunikado. La ampleksiĝo de la internaciaj kontaktoj kun ĉiam pli forta emfazo lanĉis la penson krei internacian lingvon. Al tiu ĉi temo dediĉis gravan atenton tiel elstaraj figuroj de la homa pensado, kiel Komenský, Descartes, Leibniz. En la jaro 1842 dum la novembra kunsido de la Hungara Akademio de Sciencoj parolis pri tiu problemo ankaŭ István Széchenyi, unu el la plej eminentaj figuroj de la tiama hungara politika vivo. Mi citas liajn vortojn:

„Nun, en la jarcento de la pli libera diskutado, nenio povus esti pli interesa kaj por la opaj nacioj, kaj por la homaro, ol la redaktado de tia lingvo, kiu superus nian nunan lingvon en precizeco, ja ties realigo tute ne estas malebla."

El la multaj provoj krei internacian lingvon montriĝis temporezista, vivkapabla kaj evolupova nur la lingvo Esperanto, kreita de Ludoviko Zamenhof.

La esperantistoj de nia frua periodo esperis tion, ke la mondo dum mallonga tempo akceptos Esperanton kiel unikan internacian perantan lingvon.

Tiu nobla sopirado ne realiĝis. El la centjara historio de la Esperanto-movado 50-60 jaroj estis tiaj tempoj, dum kiuj la internaciaj kontaktoj ampleksiĝis pluroble, sed tiujn daŭre regis privilegiita elito: komercistoj, diplomatoj, aristokratoj ktp. Tiu elito per la ellerno de unu-du pli-malpli disvastiĝintaj naciaj lingvoj, per interpretado, tradukado povis superi la malfacilaĵojn. Cetere tiu periodo estis plenplena je nacia malamo, kiun pezigis lokaj kaj mondaj militoj.

La Esperanto-movado renkontiĝis kun la laborista movado dum la jaroj antaŭ kaj tuj post la unua mondmilito. Tiu renkontiĝo estis io natura: la internaciismo kaj la demokratiaj strebadoj de la esperantistoj vekis simpation en la vicoj de la laborista movado. En Sovetio dum la dudekaj jaroj, en Hungario dum la Konsilia Respubliko en 1919 floris la Esperanto-movado. En la Hungaria Esperantista Societo Laborista dum la intermilita periodo agadis elstaraj figuroj de la hungara revolucia laborista movado. Sed en 1934 la kontraŭrevolucia reĝimo malpermesis la Societon. Okaze de la centjariĝo de Esperanto ni eldonis libron, kiu omaĝas al tiu ĉi glora ĉapitro de la hungara laborista kaj Esperanto-movado.

Ne nur la hungara kontraŭrevolucia reĝimo persekutis Eseranton: en la Internacia Lingvo vidis malamikon ĉia naciismo, antaŭ ĉio la faŝismo: miloj da esperantistoj mortis en la koncentrejoj de Hitler ĉie en Eŭropo. Estas trista fakto por ni, ke ankaŭ la perforto de la personkulto grave repuŝis la evoluon de la Esperanto-movado.

Malgraŭ ĉio ĉi Esperanto vivas jam depost cent jaroj kaj ĝi servas la interpopolan amikecon kaj la kulturon. Dum la unua centjaro de la lingvo estis eldonitaj dekmiloj da libroj en Esperanto, kaj atingas plurajn milojn ankaŭ la nombro de la originalaj verkoj. En la mondo aperas 150 esperantlingvaj periodaĵoj: inter ili — konvene al la pretendoj de nia epoko — havas ŝatindan proporcion la fakaj revuoj.

La evoluo de la internaciaj kontaktoj aparte vigliĝis post

la dua mondmilito. Tiun epokon karakterizas ne nur la kresko de la monda komerco, sed ankaŭ la pli frue neimagebla ampleksiĝo de la internacia turismo — ekz. el la 11 milionoj da loĝantoj de nia lando ĉiujare 5 milionoj vojaĝas eksterlanden —, sekve la lingva komunikado fariĝis afero de la amasoj. Estis ĝuste ni, hungaroj, kiuj faris proponon pri la pli intensa utiligo de Esperanto en la turismo, kaj surbaze de nia propono akceptis pri tio rezolucion la konferenco de la Mondo Turisma Organizo en Manilo.

Karaj Gekamaradoj!

La disvastiĝo, la rolo de la Internacia Lingvo dependas de tio, kiam la registaroj kaj ĝa internaciaj organizaĵoj vicigos tiun ĉi temon inter la solvendajn taskojn, kaj de tio, kian modelon povas doni, kian efikon, influon povas atingi la parolantoj kaj lernantoj de Esperanto. Ni devas vidi reale, ke antaŭ la registaroj kaj la internaciaj organizaĵoj akumuliĝis tiel multaj solvendaj problemoj — mi menciu nur la ekonomian kunlaboradon, la nuklean danĝeron, aŭ la konsternan malpuriĝon de la natura medio — ke la afero de la internacia lingvo nun ankoraŭ ne estas en la fokuso de la interesiĝo. Ni fidu en tio, ke venos la tempo, kiam la nuna situacio ŝanĝiĝos. Tio dependas ankaŭ de ni.

Karaj Gekamaradoj!

La hungaraj esperantistoj ĉiam estis elstaraj batalantoj por la nobla afero de la Internacia Lingvo.

En Hungario antaŭ 90 jaroj, en 1897 startis la Esperanto-movado. Kiel en aliaj landoj, ankaŭ ĉe ni ne atendis Esperanton glata vojo; la postrestinta pensmaniero, la konservativeco ankaŭ ĉe ni ofte malhelpis la strebadojn de la esperantistoj. Tamen ni povas senti nacian fieron pro tio, ke en Hungario fariĝis kvazaŭ tradicio, ke la vere elstaraj figuroj de la kultura vivo ĉiam elpaŝis por Esperanto. La granda hungara poeto Endre Ady en la jaro 1906 skribis pri la Internacia Lingvo jene: „Se en Hungario la intelekta kulturo estus moda, cent scienculoj skribus ĉiutage pri tio ĉi. Ĉar la problemo de la internacia lingvo estas problemo hungara ĝis la bazo de la vazo... Decus, ke el inter ni estiĝu la plej fanatikaj apostoloj de la internacia lingvo... Frenezi ni devus de la ĝojo, ke ekzistas plano, kiu lude nin enŝtelos inter la kulturajn popolojn... Kvazaŭ la mapo hurlas al ni tion, se nia menso jam estas de kvieta naturo. Per unu fojo nin ellevus la mondlingvo ankaŭ el la ungegoj de la germanaro. Ĉi tio — estas hungara problemo."

Alia granda hungara poeto, Dezső Kosztolányi verkis artikolon pri Esperanto sub la titolo „Nova kulturlingvo", la elstara verkisto Frigyes Karinthy dum kelka tempo eĉ estis prezidanto de la hungaraj esperantistoj.

Dum la dudekaj-tridekaj jaroj Hungario ludis signifan rolon en la internacia Esperanta kulturo: en Budapeŝto aperis la revuo „Literatura Mondo", kies signifon plej elokvente pruvas, ke dum la sepdekaj jaroj en ses dikaj volumoj aperis ĝia represo — en Japanio.

Post la trudita silento de la kvindekaj jaroj la hungara Esperanto-movado refondiĝis en organize efika formo aŭtune de 1960. La kvaronjarcento, forpasinta depost tiam estas sendube la plej sukcesa periodo de la Hungarlanda kariero de Esperanto. La socia prestiĝo kaj internacia aŭtoritato de nia movado daŭre kreskis. Niaj klopodoj dum tiu ĉi periodo direktiĝis al tri ĉefaj celoj.

Antaŭ ĉio ni klopodis per la specifaj ebloj de Esperanto konigi al la eksterlando nian landon, la rezultojn kaj problemojn de nia socia kaj ekonomia vivo, la plej gravajn verkojn de la hungara klasika kaj moderna literaturo. Bone servis kaj servas tiun celon nia ankaŭ internacie rekonata libroeldonado, kaj la revuo „Hungara Vivo", kiu havas abonantojn en preskaŭ 70 landoj.

Dum la pasintaj jardekoj dufoje, en 1966 kaj en 1983 ni povis aranĝi Universalan Kongreson en Budapeŝto, kiujn oni notas inter la plej multnombraj kongresoj de la internacia Esperanto-movado.

Kaj per tio fakte ni jam atingis nian duan strebon, kiu direktiĝis al tio, ke en krea maniero, preta je ĉia utila kunlaboro ni aliĝu al la laboro de la internacia Esperanto-movado, certigante por niaj membroj ĉiujn avantaĝojn de la aparteno al Universala Esperanto-Asocio.

Nia tria celo estis per la vasta popularigo, instruado de la lingvo fari ebla la atingon de lingve demokratiaj, senperaj internaciaj kontaktoj por kiel eble plej multaj civitanoj de nia lando.

La jubileo invitas fari bi-

lancon: kiagrade nia agado respondis al la supraj celoj? Ni sentas tiel, ke por la unuaj du celoj ni faris ĉion, kion permesis niaj fortoj. Ni povas firme aserti, ke ne troviĝas en la mondo alia difinebla homgrupo — ne ligiĝanta al Hungario per parencaj aŭ devenaj kontaktoj —, kiu havus tiel riĉajn kaj nuancitajn konojn pri Hungario, kiel la internacia komunumo de la Esperanto-parolantoj. La rezultoj de la hungara Esperanto-movado elvokas rekonon ĉie en la mondo, oriente tiel same, kiel okcidente, plurajn gravajn postenojn de la internacia Esperanto-movado plenumas hungaraj esperantistoj, kaj la hungaraj prelegantoj estas volonte kaj ofte akceptataj gastoj ĉie en Esperantujo.

Samtempe sur la kampo de la popularigo kaj instruado de la lingvo ni havas ŝuldojn. Fiere ni parolas pri tio, ke en la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd" okazas sur unike alta nivelo la instruado de Esperanto-instruistoj, tamen mem kritike ni devas rekoni, ke malgraŭ la multnombraj fortostreĉoj kaj rezultoj ni ne faris sufiĉe por tio, ke kiel eble plej multaj civitanoj de Hungario ekkonu la valorojn kaj utilecon de Esperanto, kaj ĝuu la avantaĝojn kiujn ebligas la ellerno de la lingvo.

Se pri la situacio antaŭ 50-60 jaroj ni povis aserti, ke la mondo povis solvi la problemojn de la internacia lingva komunikado ankaŭ sen unueca internacia peranta lingvo, tion tamen ni ne povas diri la nuno — la situacio baze ŝanĝiĝis.

En la internacia vivo okupas ĉiam pli signifajn poziciojn la angla lingvo, kaj la t.n. „spontanea" evoluo sendube pelas la akvon al la muelilo de la angla.

La interkonsentita aŭ eĉ nur nefiksita akcepto de la angla lingvo kiel unusola internacia peranta lingvo tre negative efikus al la plej baza principo de la internaciaj kontaktoj, al la samrajteco de la opaj nacioj, ja la civitanoj de la angla-lingvaj landoj havus enormajn avantaĝojn en la internacia vivo, dum ĉiuj aliaj devus dediĉi el sia vivo plurajn longajn jarojn por alproprigi — ofte nur neperfekte — la anglan lingvon. Tiuj, kiuj lernis la anglan kiel fremdan lingvon, neniam kapablos tiel regi ĝin, kiel la denaskaj parolantoj. Ja tre malmultaj homoj havas eblon pasigi longajn jarojn en angla-lingva medio. La elekto de la angla kiel internacia peranta lingvo povus konduki al tio, ke en la diversaj internaciaj organizaĵoj la denaskaj parolantoj de la angla ekhavus grandan avantaĝon, kio evidente influus la agadon de tiuj organizaĵoj.

Samtempe ni devas pensi ankaŭ pri tio, ke malantaŭ la angla lingvo staras specifa, tre valora kulturo: la miljara kulturo de la anglosaksaj popoloj. La plej efika portanto de tiu kulturo estas ĝuste la angla lingvo, tiel do per la adopto de la angla lingvo kiel unusola internacia peranta lingvo, ni akceptus ankaŭ la anglan kulturon kiel universalan kulturon, kaj tio signifus seriozan danĝeron por ĉiuj aliaj naciaj lingvoj kaj kulturoj. Granda lingvosciencisto de la 20a jarcento, Géza Bárczi atentigas pri tiu danĝero en sia artikolo „La morto de la lingvoj":

„Ĉiu nacia lingvo povas minaci alian, ĉefe se malantaŭ ĝi staras granda, riĉa popolo. La sola eliro estas, se apud la gepatra lingvo ekzistas plene neŭtrala lingvo por la rolo de dua, internacia peranta lingvo, kiu respegulas la spiriton kaj interesojn de neniu popolo..."

Esperanto, kiu laŭ multnombraj internaciaj eksperimentoj estas ellernebla dum kvarono de la tempo, necesa por la alproprigo de la naciaj lingvoj, tiamaniere do povos ebligi por la homo de la estonto la kreon de interpopola komunikado per investo de malpli da tempo; krome tiu komunikado tiel okazos por ĉiuj popoloj sur la sama bazo, neniu havos lingvajn avantaĝojn.

Estas evidente por ni, ke ankaŭ la lingva problemo de la internacia komunikado estas kampo, sur kiu ne eblas ĉion lasi al la „spontanea" evoluo, sed — kiel ankaŭ sur multaj aliaj terenoj de la vivo — necesas la konscia, krea, antaŭvidema interveno de la homo, por turni la evoluon en la direkton kiun diktas la racio.

Aro da eminentaj lingvistoj jam konstatis, ke Esperanto estas taŭga por la plenumo de la alcelata rolo. Pruvas tion la centjara historio de la lingvo, kaj la vasta literaturo aperanta en ĝi, kiu inkluzivas ankaŭ riĉan gamon de fakaj literaturoj, de la geologio ĝis la matematiko, de la geografio ĝis la ĉefa scienco de nia epoko: la komputotekniko.

La lingva problemo de la internacia komunikado estas tutgloba problemo, sed ni devas rekoni, ke nun ĝi ne estas la plej prema problemo de la homaro. La centmiliardoj elspezataj por la freneza armado, la malsatantaj centmilionoj, la pereo de la natura medio lanĉas pli akrajn, pli urĝajn taskojn ol la lingva problemo. La konstato de tiu fakto kompreneble ne povas signifi la akcepton de tio, ke sur la kampo de la lingva problemo oni faru paŝojn nur post la solvo de la grandaj tutglobaj problemoj. Tiom pli ne, ĉar la demokratia solvo de la lingva problemo en la internacia komunikado per la aplikado de Esperanto povus favore efiki la atmosferon de la internacia vivo, kaj tiamaniere stimule influus ankaŭ la solvon de la sortoproblemoj de la homaro, koncerne kiun okazas tre malmultaj paŝoj antaŭen. Al ni, esperantistoj estas donita la tasko konvinki la homojn pri la praveco de tiu rezonado. En la laboro por tiu granda kaj nobla celo helpas nin la partiaj, sociaj kaj ŝtataj organoj, kies altrangaj reprezentantoj honoris nian hodiaŭan kunvenon.

Tamen la eventoj de la historio kaj de la nuna politiko avertas nin pri tio, ke ĝis nun eĉ unusola racia penso ne triumfis per si mem, sen ĉiutaga luktado kaj persista laboro. Tion ni devas gravuri en nian cerbon sojle de la dua centjaro, kaj tiam ni ne bezonos dubi pri la sukceso.

La mondo en eta guto

Jam la kvinan fojon okazis la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj inter la 20a kaj 23a de marto, ĉi-foje kadre de la 28a Hungara Esperanto-Kongreso. Eble ne nur tio estas la kaŭzo, ke la interesiĝo pri ĝi signife kreskis – tamen laŭ la kutimaj normoj ĝi ankoraŭ ne estas kontentiga. La organizantoj plenrajte atendas pli grandan aktivadon de la esperantistoj ne nur en-, sed ankaŭ eksterlande. Kvankam tiutempe la arboj ankoraŭ ne burĝonis, ĉar la printempo ĉi-jare iom malfruis, tamen ni povas diri, ke la Esperanto-kulturo montris sin kun plenaj floroj.

Post la malfermaj vortoj de la verkisto Mihály Gergely, estrarano de HEA pri kulturaj aferoj, aperis sur la scenejo la geaktoroj de *Hungara Esperanto-Teatro*. Same kiel en la antaŭaj jaroj, ankaŭ nun ili rikoltis sukceson kun la unuaktaĵo *Gutoj* de la renoma hungara verkisto *Endre Gyárfás*, kiu cetere tiom entuziasmiĝis, ke li spektis ĉiujn prezentaĵojn de la renkontiĝo. La historio havas seriozan direndaĵon eĉ por ni esperantistoj: temas pri iu familio, en kies loĝejo likas la krano, ĝis fine la akvo plenigas jam la tutan spacon, sed la hejmanoj anstataŭ voki muntiston prefere transformiĝas en fiŝojn... La rolantaj geaktoroj *István Pathó, Ági Pataki* kaj *Kata Varga* pruvis per konvinkaj fortoj la realecon de tiu ĉi absurdaĵo. La teatraĵon reĝisoris *László Kelemen,* kiu estas la vivanta kaj senĉese aktivantaanimodeHungaraEsperanto-



Stefan MacGill amuzas la publikon

Tomaŝ Plaszky el Slovakio





István Patkó, Kata Varga kaj Ági Pataki en „Gutoj"

Teatro. Post tio aperis sur la scenejo la ĉie konata *Stefan MacGill* por montri kurban spegulon por ni per siaj skeĉoj. *Tomas Plaszky* estas konata pupartisto ne nur en sia hejmlando Slovakio, sed jam ankaŭ en la Esperanto-movado. Li ankaŭ ĉi-foje bone amuzis la publikon per *Janĉjo Pizeto* kaj *Gajaj fantomĉoj*.

Sabate kaj dimanĉe vespere gastludis *Bulgara Esperanto-Teatro*, fondita en 1958, prezentante sur altega nivelo la teatraĵon *Pikniko sur la batalkampo* de la hispana *Fernando Arabal*. Ĝi estas denove absurdaĵo: sur la fronto ĉe la soldatfilo aperas la gepatroj por pikniki. Dume ili sukcesas kapti malamikon, kiun ili jen invitas kunmangki, jen ŝnurligas. Tamen fine ili alvenas la punkton prezentis la argumentojn de la batalantaj armeoj, kaj evidentiĝas, ke la generaloj ambaŭloke incitas la popolon per la samaj mensogaj argumentoj... La direndaĵo pri pacamo kortuŝe reliefiĝis dank' al la altnivela ludo de la geaktoroj *merita artisto Nikolaj Uzunov* (Zepo), *Pančo Černev* (Zapo), *Nikolaj Klisurov* (S-ro Tepan), *Ginka Toteva* (Dua flegisto). La tuta prezentaĵo laŭdas la laboron de la reĝisorino *merita artistino Gertruda Lukanova*. La traduko estis altnivela, multe simila al la parola lingvo – ĝi estas verko de *Kunĉo Valev*. La scenografio kaj la kostumoj de *Maja Uzunova* estis epokfidelaj kaj nuance ellaboritaj. La muzika aranĝo de *Orgnjan Atanasov* faris kompleta la efikon.

Johano la brava de *Sándor Petőfi*, respektive la pupteatraĵo farita el ĝi, brave eltenas la ŝtormojn de la pasanta tempo, unuavice pro la entuziasmo de la hungara pupisto *Róbert Bánky*, kiu kun la trupo de la *Hungara Ŝtata Pupteatro* ĝin prezentas de tempo al tempo sur alta nivelo. Kvankam la traduko de la hungaraj popolkantoj, kiuj buntigas la direndaĵon, estas kelkloke lama, tamen ĉiufoje ĝi rikoltas aplaŭdegon de la infanoj. Tiel okazis ankaŭ dimanĉe posttagmeze.

En la dimanĉa vespero – pro la vendreda granda sukceso – denove sekvis skeĉoj de Stefan MacGill, nov-zelandano vivanta en Hungario. Ĝi estis deserto apud la bulgara prezentaĵo.

La 23-an de marto lunde la spektantoj ĝuis du monodramojn. *Kálmán Szabó* kun artisma fajneco prezentis *La lastan magnetofonbendon de Krapp* el la plumo de *Samuel Beckett*. Belega, eterne

Vida Jerman en „Virino, kiu flustris en uragano"



belega pledo por la disipitaj ebloj de la vivo – kiu eĉ post jaroj plenigas nian animon per delikata konsciencriproĉo kaj vuala doloro. Estas granda entrepreno ludi sur la scenejo sola por centoj. Tio ne timiga niajn geaktorojn. En la dua duono de la vespero sekvis la jugoslavia aktorino *Vida Jerman* el Zagrebo. Ŝi elektis la pecon *Virino, kiu flustris en uragano* pri la vivo de la fama japana esperantistino *Verda Majo,* kiu transloĝiĝis en Ĉinion. Ŝian historion priskribis *Hasegawa Teru,* kiun poste monodramigis *Spomenka Štimec.* La reĝisoro estis *Radovan Marĉić.* Ĝin plene ĝuis tiuj, kiuj interesiĝas pri nia Esperanta historio.

La 29an de marto, dimanĉe, la lastan tagon de la Budapeŝta Printempa Festivalo, okazis vera unikaĵo en la kulturhistorio de Esperanto. Estis prezentata la lirika kantato *Puto de Sankta Johano* komponita de la maljuna hungara majstro *Ferenc Farkas* laŭ la poemoj de la Transilvania hungara poeto *Jenő Dsida.* La komponisto ĉeestis la prezenton, kiu en la nova lingvo kortuŝis lin, kvankam, li diris, ke la lingvo ne estas tute nova por li, ĉar en la infanaĝo li foje lernis ĝin – kaj nun



Sceno el „Pikniko sur la batalkampo" – Bulgara Esperanto-Teatro denove ravis la Budapeŝtan publikon

eble li rekomencos la intertempe forlasitan lingvolernadon. La oratorio *Mesio* de *Händal* dum la pasintaj jarcentoj ĉiam apartenis al la furoraj muzikaĵoj. Okazis ankaŭ nun tiel, la montrataj detaloj akiris neĉeseman aplaŭdŝtormon en *Pesti Vigadó* muzika centro de Budapeŝto, kie ĝin prezentis la 100-membra *Universitata Koruso* de la *Hungara Centra Junulara Ensemblo.* La prezento postulis amasegon de laboro, kiu estas plenumita unuavice dank' al la fervoro de la talenta korusestro *Gábor Hollerung.* La koruson akompanis la vastigita *Kamarorkestro de la Hungara Ŝtata Koncertorkestro.* La solistoj *Ibolya Verebics, Éva Pánczél, László Márk* kaj *Béla Szilágyi* prezentis la kremon de sia kantarto kun senriproĉa prononco. La tekstojn por ambaŭ muzikpecoj tradukis *Imre Szabó* sur poezia nivelo kaj kun la kutima inventemo. Instruo de la prezento, kiu altiris multajn neesperantistojn, estas, ke ni esperantistoj devas iri sur tiu ĉi vojo plu, ĉar la plej bona propagando estas, se ni esperantistoj kaj neesperantistoj havas komunajn ĝuojn. La muziko kunligas nin, tion ni ne forgesu.

Estas solvenda problemo, ke tiuj prezentaĵoj kutime havas efemeran vivon: oni prezentas ilin unu-du fojojn, kaj poste venas la forgeso. Kvankam estas metodo eternigi ilin per magnetofonoj (la sonregistraĵoj ĉeteblas cetere en la vendejo de HEA!), tamen ni devas ilin prezentigi pli ofte – tio bezonas internacia-skalan organizan laboron. La parametroj por organizantoj de diversaj Esperanto-renkontiĝoj kaj aliaj eventoj estas akireblaj ĉe Hungara Esperanto-Asocio. Ni invitu ilin al ni, ja la plej multekosta teatraĵo estas tiu, kiun oni prezentas nur unu fojon. Do, ni esperu, kaj ne nur esperu, sed organizu!

Prezento de la lirika kantato „Puto de Sankta Johano". (Fotoj de Z. Fejér)

ESPERANTO TAMEN PROGRESAS

La centjariĝo alportis ne ĝeneralan ĝojon kaj jubilean jubilon, sed multloke skeptikismon kaj elreviĝon. Tio estas cetere tute natura sekvo de la antaŭa troentuziasmo kaj manko de realismo. Esperanto ankaŭ en la jubilea jaro ne estas malpli sukcesa ol en la antaŭaj. Tamen la ronda datreveno instigas ĉiujn esperantistojn rerigardi al la plenumita vojo, al la rezultoj. Kaj ĝis nun Esperanto ne venkis – ĉu sufiĉa kialo por senesperiĝi? La datreveno tamen estas sufiĉa kialo por trarigardi sobre la rezultojn, analizi la kaŭzojn de la fiaskoj kaj realisme difini la novajn taskojn por la venontaj jaroj. Kvankam nun komenciĝas nova jarcento, tamen ankaŭ ĝi konsistos nur el sinsekvaj minutoj, kiujn ni devas plenigi per laboro.

La socialismaj landoj havis ankaŭ malgrandan jubileon kadre de la granda centjara. En Budapeŝto okazis la 20a Konsultiĝo de la Reprezentantoj de la Esperanto-Organizaĵoj el la Socialismaj Landoj, inter la 12a kaj 16a de aprilo. En sia malferma parolo d-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de HEA, akcentis, ke, kvankam la interesoj de la socialismaj landoj ankaŭ forte postulas la aplikadon de la internacia neŭtrala lingvo, tamen ili ne faris ĝis nun ĉion eblan en tiu ĉi rilato. La laboro devas esti farata kaj supre, kaj malsupre same intense, ĉar sen amasa movado ne eblas atingi politikajn sukcesojn por Esperanto, kaj samtempe ankaŭ sen politika subteno ne povas ekesti fortika movado. Li skizis la eblojn de politikaj paŝoj por plifortigi la statuson de Esperanto.

Post la skizo de la historio de la Konsultiĝoj, kiu substrekis la reciprokan helpemon, solidaron kaj la realismajn tendencojn estiĝintajn pere de ili, sekvis la prezento de la statuso de Esperanto en la opaj socialismaj landoj.

Bulgara Esperantista Asocio eniris la jaron ekonomie kaj organize forta. Ĝi havas ĉirkaŭ 200 societojn (grupojn) kaj pli ol 120 lernantajn Esperanto-Klubojn. Ankaŭ la nombro de la membraro estas belega: 9.000. Ĉe la Centra Estraro funkcias du grandaj entreprenoj: Internacia Esperanto-Kursejo, kiu akceptas esperantistojn kaj amikojn de Esperanto en siaj hoteloj en Pisanica kaj Varna; la alia estas Ĉefa Ekonomia Direkcio, al kiu apartenas dudeko da uzinoj – dank' al tiu ĉi mastruma agado, en pluraj urboj estas konstruitaj kaj konstruataj memstaraj Esperanto-klubejoj. BEA havas altan socian prestiĝon ĉe la aŭtoritatoj, nun ĝi intencas eldoni nacilingvan informan revuon por fortigi la socian interesiĝon pri Esperanto.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio iom malkreskis, tamen donas esperon pri la futuro tio, ke freŝaj fortoj estas altiritaj. En Ĉeĥio estiĝis forta faka laboro rekonata eĉ de la Ĉeĥa Scienceteknika Asocio. Slovaka Esperanto-Asocio antaŭ jaroj entreprenis la grandiozan laboron rekonstrui historiaj kastelojn – post la fino de tiuj fortostreĉoj ili havos 77 ejojn por akcepti gastojn moderpreze. La membraro vastiĝis en antaŭe neimagebla skalo.

En Germana Demokratia Respubliko la Kulturligo certigas bonajn kadrojn por la agado, kiu per la amasa altiro de gejunuloj signife fortiĝis. GDREA havas novan oficejon, pli luksan ol la antaŭa, en la strato Friedrichstr. 120, Berlino.

La Asocion de Sovetiaj Esperantistoj karakterizas juneco kaj imponeco de la aranĝaĵoj. Artikoloj pri Esperanto aperas po centoj en la nacilingva gazetaro. Esperantistoj organizas ekspediciojn kaj lanĉis la ideon konstrui lernejojn „100 jaroj de Esperanto" en Nikaragvo kaj Kartvelio.

Pola Esperanto-Asocio travivas nuntempe febran aktivadon por sukcesigi la 72an Universalan Kongreson de Esperanto. PEA ricevas novan lokon en la Palaco de Kulturo kaj Sciencoj. En la radio komenciĝos Esperanto-kurso.

La agadon de Hungara Esperanto-Asocio rekonas multaj sociaj organizoj. Ni menciu nur, ke ĝi ricevis la ordenon „Paco kaj Amikeco"; János Kádár, ĝenerala sekretario de HSLP, perletere salutis la redakcion de Hungara Vivo okaze de ĝia 25-jariĝo kaj la esperantistojn okaze de nia jubileo (la teksto de tiu letero estas legebla en tiu ĉi n-ro de HV); HEA estas akceptita kiel plenrajta membro en la Asocio de Libroeldonejoj kaj Librokomercaj Firmaoj ktp. HEA ekhavis novan statuton, kiu ebligas pli vastajn kadrojn por la varbado de membroj ol la ĝisnuna. La centra administrado okazas per komputilo same, kiel la kompostado de la abunde eldonataj libroj. En la priesperanta informa ondo havis enorman rolon la hungarlingva libro de Nemere: Libro de novaj sekretoj (eldonita rekorde en 150.000 ekzempleroj) kaj la libro de la fama lingvisto Géza Bárczi: Pri la internacia lingvo. HEA ekhavis novan sidejon en la historia kvartalo de Budapeŝto.

Ĉiujn el la menciitaj asocioj karakterizas, ke ili per sociologiaj esploroj intencas ekkoni la laŭleĝecojn de la movado por povi pli reale difini la celojn en la informado, varbado kaj organizado. Ili ĉiuj strebas plialtigi la lingvan nivelon, plivastigi la servojn. En pluraj landoj oni instruas Esperanton – nun la solvenda problemo estas ne perdi tiujn amasojn, kiuj lernas ĝin, post la fino de la lernado. Ĉiuj landoj havas sian propran Esperant-lingvan gazeton, la nuna fenomeno estas, ke – rekonante la organizan rolon de la gazetaro – ankaŭ la distriktaj, departementaj komitatoj kaj fakaj organizoj komencas aperigi siajn bultenojn. La centjariĝo alportis vastan interesiĝon pri nia lingvo: en la nacia gazetaro aperas ampleksaj artikoloj amase.

Eblas konstati, ke tiaj konsultiĝoj kaj kunlaboro inter la grupoj de la Esperanto-Asocioj en la samtipaj landoj estas nepre fruktodonaj kaj konsilindaj ankaŭ al tiuj, kiuj ankoraŭ ne faras ĝin. Ni ne forgesu, ke Esperanto estas internacia lingvo, ni devas forĝi la sukceson kune.

La partoprenantoj de la 20a Konsultiĝo de Esperanto-Asocioj de Socialismaj Landoj (Foto de Z. Fejér)

János Szabó (1897-1987)

Ni denove funebras kamaradon, amikon, kunlaboranton, kiu per siaj konsiloj kaj spertoj, dum jardekoj malegoisme servis la ideon de la kooperativismo, de la progreso; la aferon de kreado de socialisma reĝimo kaj la sukceson de nia konstrulaboro. Dum sia longa kaj sukcesa vivovojo li disvolvis laboron en tri landoj: en Hungario, Sovetio kaj Ĉeĥoslovakio.

János Szabó, nia meritplena veterano naskiĝis en la jaro 1897 en la urbo Érsekújvár (nun Nové Zámky en Ĉeĥoslovakio). Estinte malriĉa infano jam frue li devis ekkoni ankaŭ la malfacilan flankon de la vivo. Kiel metilernanto jam kiel 12-jara infano li aniĝis al la laborista movado, al kiu li restis fidela dum sia tuta vivo. Tiu vivo, kvankam ĝi estis luktoplena, tamen estis riĉa je eventoj kaj eĉ sukcesoj.

Partopreninte la unuan mondmiliton li grave vundiĝis. Post la resaniĝo, en 1919, kiel soldato de la Ruĝa Regimento de Ĉepel (laborista distrikto en Budapeŝto), li partoprenis la batalojn de la Hungara Konsilantara Respubliko. Li kaptiĝis kaj estis kondamnita al malliberejo. De tie li fuĝis en Ĉeĥoslovakion, kie li estis unu el la fondintoj de la Ĉeĥoslovaka Komunista Partio.

Fine de 1922 en la nomo de la Komunista Internacio Lenin alvokis la laboristojn de la mondo: ili organizu kampanjon por helpi la unuan landon de la proletoj.

La kooperativo de Žilina akceptis rezolucion pri ekonomia helpo al Sovetio. Helpe de la Ĉeĥoslovaka Komunista Partio baldaŭ fondiĝis kooperativoj, kiuj transloĝiĝis en Sovetion. Unu el ili estis INTERHELPO. La Esperanto-vorto signifanta reciprokan helpon, bone montras la planon de la kooperativanoj: la oficiala lingvo de la naskiĝonta kooperativo, pro la multlingveco de la anaro estos Esperanto — skribis János Szabó en sia libro: Internaciistoj en Kirgizio (Budapest, 1975, Libroeldonejo Kossuth).

La kooperativo INTERHELPO hodiaŭ jam apartenas al la historio. Ne nur al tiu de la kooprativoj, sed ankaŭ al la historio de nia Centjara Esperanto. Krome la nuntempaj kooperativaj esperantistoj konsideras INTERHELPON kiel antaŭulon kaj unuan utiligon de la Internacia Lingvo en la kooperativa movado.

La unua grupo de la interhelpanoj la 29-an de marto en 1925 transloĝiĝis en Sovetion, en Kirgizion, en la urbon Piŝpek, (hodiaŭ Frunze), kie la kolektivo konsistanta el 371 internaciistoj kaj ties familianoj el 13 nacioj, komencis heroan laboron, kreante prosperan industrion meze de la stepo.

Kamarado János Szabó transloĝiĝis en Sovetion kun tiu unua grupo kaj sesfoje li plenumis la taskon de la prezidanto en INTERHELPO. Poste inter 1935 kaj 1950 li estis ministro en la Kirgiza Socialisma Respubliko. Liajn elstarajn meritojn rekonis kaj Sovetio kaj Hungario per multe da ordenoj.

János Szabó revenis Hungarion en 1950, por helpi sian patrujon per la riĉaj spertoj, akiritaj en Sovetio en la konstruado de la socialismo kaj en la organizado de la kooperativa industrio.

Ankaŭ en Hungario li plenumis diversajn altajn postenojn, partiajn, kooperativajn. Li estis vicministro, kaj poste kiel ministro gvidis la Konstruan kaj Urboevoluigan Ministerion.

Post la hejmenveno li konstante zorgis pri la afero de la industria kooperativa movado, kies batalanto li restis ĝis la lasta bato de sia nobla koro.

Ankaŭ la Esperantomovado gardos la memoron de lia aminda, ĉiam helpopreta personeco. La noblan ekzemplon de la persisto en la efektivigo de justa afero, kiu karakterizis lian vivon, ni neniam forgesos.

Árpád *Abonyi-Nagy*

Frigyes Karinthy (1887-1938)

Mi instruas mian fileton

Frigyes Karinthy (pron. fri!djeŝ ka!rinti) estis unu el la plej multflankaj talentoj de la hungara literaturo: bona poeto, eminenta prozisto kaj la plej granda hungara humuristo. Sian unuan sukceson li rikoltas per literaturaj parodioj, kolektitaj sub la titolo „Tiel vi verkas": pluraj liaj parodioj pli profunden penetras en la parodiatajn verkojn, ol multaj kritikaj analizoj. Lia talento havis filozofian karakteron, li apartenis al la plej konsekvencaj kaj konsciaj posteuloj de la klerismo de la 18a jarcento. Li ŝatas la fantastikan ĝenron: eĉ dufoje li revivigas Guliveron, la romanheroon de Swift, por sendi la bravan briton unue en la mondon de maŝinoj, havantaj konscion (Vojaĝo al Faremido), kaj poste en submaran regnon, kie regas virinoj (Kapilario): (Ambaŭ verkoj aperis en Esperanto, la unua eĉ dufoje.) En 1936 oni malkovras ĉe li cerban tumoron, kiu tiutempe estis malsano apenaŭ kuracebla. Lin operaciis la fama sveda kirurgo Olivecrona, kaj ŝajnis, ke Karinthy saniĝis. Pri la malsano kaj la operacio li verkis sian plej faman kaj unikan libron kun la titolo „Vojaĝo ĉirkaŭ mia kranio". Post du jaroj neatendite li mortis. Kiel nepra adepto de la raciismo, li rekonis la signifon de Esperanto: dum kelkaj jaroj li eĉ estis prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo. Multaj liaj noveloj kaj poemoj aperis en diversaj E-revuoj: libroforme eldoniĝis – krom la supre menciitaj romanoj – la dramo „Morgaŭ matene" (tr. K. Kalocsay) kaj la novelkolekto „Norda vento" (tr. K. Bodó). Omaĝe al la cenjara datreveno de lia naskiĝo ni aperigas unu el liaj humuraĵoj.

Se en naŭ fornoj dum kvin kaj duono da tagoj dekdu kuboj metroj da fago forbrulas, – dum kiom da tagoj forbrulas en dekdu fornoj naŭ kubaj metroj da fago...

– Se en naŭ fornoj...

Mi sidas ĉe la skribotablo, kaj legas artikolon. Mi ne povas koncentriĝi. El la alia ĉambro jam tridek kvin foje mi aŭdis la supran frazon.

Kia miraklo okazis al tiu fago? Mi devas tien.

Gabi, la fileto kurbiĝante super la skribotablo maĉas la plumon. Mi faras, kvazaŭ mi venus pro alia afero, singravigante serĉadas en la libroŝranko. Gabi kaŝe rigardas min, mi kuntiras la okulojn, kvazaŭ mi estus forte okupata pri miaj zorgoj, kaj ne rimarkus lin. – Mi sentas, li pensas, dume mi streĉe ripetadas mute: „Se naŭ fagoj... dekdu kubaj metroj... tiam en kiom da fornoj..." Eh, diablo! Kiel ĝi estas?

Mi iras antaŭ li distriĝeme, haltas, kvazaŭ en tiu ĉi sekundo mi rimarkintus lin.

– Nu, kio estas, fileto, ĉu vi lernas?

La buŝo de Gabi kurbiĝas malsupren.

– Paĉjo...

– Kio estas?

– Mi ne komprenas tiun ĉi aferon.

– Mi ne komprenas?! Gabi!... Kiel vi povas diri ion tian? Eble oni ne klarigis ĝin en la lernejo?

– Jes, ja, nur...

Mi akrigas la gorĝon. Poste mi diras krude kaj malamikece:

– Kio estas tio, kion vi ne komprenas?

Gabi avide, rapide kaj sereniĝinte komencas rapidege paroli, kvazaŭ de kies ŝultro oni deprenis grandan ŝarĝon.

– Vidu, paĉjo, se en naŭ fornoj dum kvin kaj duono da tagoj dekdu kubaj metroj da fagoj forbrulas...

Mi, indigne:

– Papperlapapp!... Ne vortgalopu! Tiel oni ne povas intelekte pensadi. Diru denove trankvile, kaj pripensinte, tiam vi komprenos! N-nu! Donu al mi iom da loko.

Gabi feliĉe kaj vigle flankentiriĝas. Li kredas, ke mi nun ne scias; li jam konfidis al ni la tutan aferon. – Li ne scias, kaj nature ne povas memori la saman scenon, antaŭ dudek-kelkaj jaroj, kiam mi tiriĝis flanken tiamaniere, feliĉe kaj malpeziĝinte, kaj mia patro sidiĝis apud mi kun la sama indigna kaj singraviga mieno, kiel nun mi. Kaj kio estas plej terura, en ĉi sekundo trakuris min, – temis pri la sama tasko ankaŭ tiam!... Estas tiel, sen dubo!... la fagoj kaj la fornoj... Sankta Dio! Sed mi tiam jam preskaŭ ekkomprenis, nur mi forgesis!...

Nia tuta dudekkelkjara ago dum unu minuto falis en la nenion. Kiel tio estis?...

– Vidu Gabi! – mi diras pacience, – oni ne per la buŝo pensadas, sed per la menso. Kion vi ne komprenas? Ĝi estas tiel klara kaj hela, kiel la suno. – Tion komprenas unuaklasa elementlerneja knabeto, se li atentas unu minuton. Vidu filo mia! Ĉi tie estas: en naŭ fornoj dum kvin kaj duono da tagoj tiom kaj tiom da fagoj forbrulas. N-nu; kion vi ne komprenas el tio?

– Tion mi komprenas, paĉjo, nur tion ne, ĉu la unua proporcio estas inversa, kaj la dua estas direkta, aŭ la unua estas direkta, kaj la alia inversa, aŭ ambaŭ estas direktaj, aŭ ambaŭ estas inversaj...

Mia kapohaŭto ĉe la radiko de la haroj malrapide

komencas malvarmiĝi. Kion babiladas tiun ĉi pri proporcioj? Kiuj povas esti tiuj malbenitaj proporcioj? De kie mi povus subite ekscii?

Nun mi laŭte atentigas lin:

– Gabi! Vi jam denove vortgalopas. Kiel vi volas tiamaniere ekkompreni? Oni per la buŝo... nu, kiel? – Kio estas inversa kaj direkta; direkta kaj inversa, – papperlapapp, aŭ la sur la muron grimpinta kontrabasisto.

Gabi ridegas. Mi kriegas al li:

– Ne ridegu! Ĉu pro tio mi instruas vin, luktadas kun vi?... Tio estas, ĉar vi ne atentas en la lernejo! Ja vi eĉ tion ne scias... tion ne scias... (mi konsternite rigardas lin kvazaŭ en mi vekiĝus terura suspekto): ja vi eble eĉ tion ne scias, kio estas proporcio?!

– Sed jes, paĉjo... La proporcio,... la proporcio estas la du rilatoj, en kiuj la kvociento de internaj partoj respektive la produto de eksteraj partoj...

Mi kunfrapas la manojn:

– Mi diras, – dekkvarjara bubo, kaj li ne scias, kio estas proporcio!

La buŝo de Gabi denove kurbiĝas malsupren.

– Do, kio?

– Nu, kio? Haltu, bubo! Nun vi tuj prenu la libron, kaj tridekfoje ripetu, – ĉar alimaniere...

Gabi konsternite plu-foliumas la libron, kaj komencas diri rapidege:

– La proporcio estas tia kvanto, kies du internaj partoj tiel rilatas al la du aliaj kvantoj, kiel... jes, paĉjo, sed kiuj estas ĉi tie la du internaj partoj; ĉu la volumeno de la fagoj, kaj la nombro de la tagoj, aŭ la nombro de la fornoj, kaj la volumeno de la fagoj?

– Vi denove vortgalopas! – Donu la libron. Kaj nun mi komencas ege serioze.

– Vidu, Gabi, ne estu stulta. Ja ĝi estas tiel klara kaj hela, kiel la suno. Rigardu, kiel simpla! N-nu! Atentu! Ĝi diras: en naŭ fornoj dum tiom da tagoj tiom kaj tiom da fagoj. – Do, se tiom kaj tiom da fagoj dum naŭ tagoj, tiam estas klare, ĉu ne, ke dum dekdu tagoj ne tiom kaj tiom, sed...

– Jes, paĉjo, ĝis tie ĉi ankaŭ mi komprenas, sed la proporcioj...

Min kaptas kolero.

– Ne babiladu! tiel mi ne komp... vi ne komprenas. Atentu! Se dum naŭ tagoj tiom kaj tiom, – tiam dum dekdu tagoj – ni diru, eventuale tiom, kaj iom pli. Sed pardonu, tio ne estas pli, ĉar ne en naŭ fornoj, sed en dekdu. Do, per iom malpli, pli precize pli, ol estus per ĝuste tiom malpli, ol per kiom estis pli... Ĉi tie nome la proporcio... la proporcio...

Subite ekbrulas lumo en mia cerbo. Kiel fulmofrapo, tiel trafas min la Granda Rekono, kies manko de dudek-kelkaj jaroj kaŝiĝas kaj malserenas en mi – estas tiel, nun mi eksciis! Ne esatas dubo! Tiam tie, – tute evidente estas tiel, – ankaŭ mia patro ne komprenis tiun ĉi taskon!

Kaŝe mi rigardas al Gabi. Li, dumtempe, ne rimarkeble malfermis la historian libron, kaj nun duonokule rigardas tiun scenon kun granda ĝuo sur la malnova bildo, kiel la hungara heroo Paŭlo Kiniji knedas du turkojn.

Mi batis sur lian kapon forte.

– Jen!... Mi ne estas stulta luktadi kun vi, kiam vi ne atentas.

Gabi ploregas, kiel la du turkoj kune.

Kaj mi malpeziĝinte saltleviĝas, kaj tra la nebulo de la pasinto desegniĝas antaŭ mi vizaĝo, – la vizaĝo de mia patro, – kiam li forte batis sur mian kapon, gaje kaj malpeziĝinte, kvazaŭ li dirus: „Vi pludonu ĝin al via filo: por mi jam sufiĉis!" Kaj fajfetante, kun poŝen metitaj manoj, gaje ekiras al la tombo, kie estas tutegale, dum kiom da tagoj forbrulas naŭ kub metroj da fagoj, kaj sesdek-sepdek jaroj da vivo...

El la hungara: Tibor Bessenyei

84 JARA

DUMVIVA MEMBRO DE HEA

La unua dumviva membro de HEA fariĝis esperantistino el Pécs: *Irén Prassnig*, kiu nun havas 84 jarojn.

Kiam ŝi legis la anoncon pri la nova membrokategorio, la dumviva membreco de Hungara Esperanto-Asocio, ŝi tuj pagis la kotizon, kiu egalas al 20 jara membrokotizo.

„Mia patro, kiu estis progresema ferlaboristo, tornisto, iam legis pri Esperanto en iu maldekstra gazeto. Li konsilis al mi, ke mi ellernu ĝin. Pro tio mi iĝis esperantisto en 1925."

***Irén Prassnig* aktive kaj sinofere agadis en la laborista Esperanto-movado. En 1926 fondiĝis la unua laborista Esperanto-grupo en Pécs, kiu apartenis al la Hungarlanda Esperantista Societo Laborista. Ŝi tre aktive partoprenis en la starigo de la grupo, kaj malgraŭ malfacilaĵoj, sub tre pezaj cirkonstancoj ŝi estis motoro de la laborista Esperanto-vivo en Pécs. Post la liberiĝo venis la nova tasko por ŝi, kontribui al la reorganizado de la loka Esperanto-movado. Ekde 1961 ŝi laboris en la packomisiono de HEA.**

„En la lastaj jaroj mi nur malfacile povas forlasi la hejmon, tial — tre bedaŭrinde — mi ne povas viziti nian ŝatatan Esperanto-klubon. Sed mi atente sekvas la okazintaĵojn en la movado. Mi abonas kaj legas kvin gazetojn. Mi ĉiam aŭskultas viajn Esperanto-radioprogramojn. Antaŭnelonge tre bele parolis tiu ĉina kamarado! Se aperas anonco pri letervespero aŭ pri planata ekspozicio, mi tuj reagas. Hieraŭ mi sendis Ady-volumon al iu Azia lando. Ĉiam mi volas subteni Esperanton, per ĉiuj miaj ebloj kaj fortoj. Tial mi pagis la dumvivan membrokotizon, ĉar Esperanto meritas la apogon."

P.F.

FLUGBILETOJ VENDADO DE MEMORAĴOJ ĈIĈERONADO

ORGANIZADO DE PROGRAMOJ INTERPRETADO VETURBILETOJ POR EKSTERLANDO KAJ HUNGARIO

CERTIGO DE TRANOKTEJO: EN HOTELOJ, KAMPADEJOJ, PRIVATAJ ĈAMBROJ EKSKURSOJ AL LA ĈIRKAŬAĴO

VIA DOMMASTRO
EN DEPARTEMENTO HEVES:

Eger TOURIST

Eger TOURIST

EGERTOURIST – Turisma Oficejo de Departemento Heves
3300 Eger, Szarvas tér 1.
Tel.: 36/11-225, 36/10-946
Tx.: 63-424

Ĉeja oficejo:
EGERTOURIST
3300 Eger, Bajcsy-Zs. u.9.
Tel.: 36/11-724, 36/13-249
Tx.: 63-378

Oficejoj:
MÁTRATOURIST
3200 Gyöngyös, Szabadság tér 2.
Tel.: 37/11-565
Tx.: 25-285

3360 Heves, Erkel F. u.1.
Tel.: 11-907

Kampadejoj kaj moteloj:
Aŭtista Kampadejo **
3300 Eger, Rákóczi u. 79.
Telefono: 36/10-558

Surmonta Kampadejo **
3348 Szilvásvárad, Egri u. 36/a.
Tel.: 36/55-207
Tx.: 63-449

Kampadejo de Sástó **
Mátrafüred, Sástó
Tel.: 37/74-025

Turista Motelo
3300 Eger, Mekchey u. 2.
Tel.: 36/10-014

Mini-Motelo
3300 Eger, Lenin u. 11.
Tel.: 36/11-388

Ni invitas Vin por:

FERII

EKURSI

PARTOPRENI
EN NIAJ PROGRAMOJ

POSTULU NIAN SENPAGAN ESPERANTLINGVAN PROSPEKTON!

MONANĜADO TURISMAJ INFORMOJ ELDONAĴOJ

HUNGARIO – NE PLU »FUTBOLI«

La hungara nacia teamo en la Meksikia futbala mondĉampionado la 2-an de junio 1986 ludis sian unuan matĉon, kontraŭ Sovetio. Apenaŭ pasis kvar minutoj kaj la sovetianoj jam festis sian duan golon. La hungara dekunuo disfalis kaj inerte, preskaŭ sen ia ajn kontraŭstaro ricevis pluajn kvar golojn. Post la 6-0-a malvenko sekvis kiel kontraŭlo la plej malforta teamo de la mondĉampionado, Kanado. La hungaraj futbalistoj ludis eĉ pli malbone ol unue, sed tamen sukcesis la 2-0-a venko. En la tria matĉo, kontraŭ la Eŭropa ĉampiono Francio la hungaraj avanuloj kelkfoje kreis danĝerajn situaciojn ĉe la franca golejo, sed senrezulte. Platini kaj liaj samteamanoj sen fortostreĉo akiris la 3-0-an venkon. Per tio finiĝis la mondĉampionado por la hungaraj futbalistoj.

La senforteco kaj konfuziteco de la hungaraj piedpilkistoj precipe en la unua matĉo estis okulfrapa, sed ankaŭ en la du aliaj ili ludis plorinde malbone. Evidente la cirkonstancoj en Meksikio estis maloportunaj por nia teamo: la matĉoj okazis en tagmeza varmego, kaj pro la alteco eĉ la spirado estis multe pli malfacila ol en Eŭropo. Nature, la cirkonstancoj estis tute same malfavoraj por la sovetianoj kaj la francoj. Ĉar la hungara publiko dum longa tempo ne ricevis kredeblajn klarigojn pri la okazintaĵoj, tuj ekestis diversaj onidiroj. Kelkaj asertis, ke nia teamo uzis pilolajn stimulilojn, sed la malĝusta dozo efikis neatendite. La kontrolo en Meksikio estis tre severa, tial ĉi tiu varianto estas ekskludebla. Aliaj opiniis, ke la hungaraj ludistoj estis fizike troŝarĝitaj dum la lastaj semajnoj de la preparĝo, kaj ili kolapsis antaŭ la unua matĉo. Post la reveno al Hungario kelkaj membroj de la teamo plendis, ke en Meksikio ili devis manĝi tro da pastaĵoj kaj apenaŭ viandon, pro tio ili perdis la forton. (La menuon preskribis la kuracisto de la teamo.) Vane atendis la publiko respondon ankaŭ al tiu demando: Kial ne ĉeestis en Meksikio Tibor Nyilasi, kiu povintus esti gvida personeco de la teamo en la krizaj momentoj?

György Mezey, la ĉeftrejnisto de la teamo asertis, ke la plej grava kaŭzo de la malsukceso estis la ŝoko pro la du goloj en tiuj unuaj kvar minutoj, en la matĉo kontraŭ la sovetianoj. Aliajn signifajn kaŭzojn li ne trovis. Post la reveno al Budapeŝto Mezey — kun oficiala permeso — „fuĝis" al Kuvaito, kie li nun estas la ĉeftrejnisto de la tiea nacia teamo. La komuniko de la federacio de Hungaraj Futbalistoj pri la okazintaĵoj en Meksikio aperis finfine en julio, sed ĝia nebula vortumado nur kolerigis la publikon, kiu postulis la malkovron de la „granda sekreto". Ĉar la libroeldonejoj lastatempe estas tre interesitaj je la enspezo, ili eluzis ĉi tiun eblecon kaj unu post la alia aperis ĉ. 6 libroj pri la okazintaĵoj en kaj antaŭ Meksikio. El inter tiuj la plej furore vendiĝis la verko de Antal Végh, titolita „Gyógyít6atlan" (Nekuracebla). En la hungara lingvo la sufikso „-ebl" sonas same, kiel la cifero „6", tial la titolo aludas la ses golojn ricevitajn de la sovetianoj. La „Nekuracebla" aludas ankaŭ la titolon de pli frua, en la sepdekaj jaroj verkita libro de Végh: „Kial estas malsana la hungara futbalo?"

La 54 jara Antal Végh depost la fruaj sesdekaj jaroj estis konata verkisto en Hungario, sed la veran famon por li certigis la futbalaj verkoj. La rapide elĉerpiĝinta „Nekuracebla" eldoniĝis en 250.000 ekzempleroj, kiu estas grandega kvanto en Hungario, ja pasintjare malpli ol 10 libroj superis la 200.000 ekzemplerojn. La verkon „Nekuracebla" ne karakterizas la „seka" objektiveco, en ĝi troviĝas multaj nepruveblaj asertoj pri la respondeco de pluraj konkretaj personoj. Ĝuste la konkretaĵoj allogis la legantojn kaj tio, ke la libro estis verkita kun la sama kolero, kian la publiko sentis: ne nur pro la malvenkoj sed ankaŭ pro la sento de la trompiteco, ja la publiko ne ricevis verajn klarigojn de la oficialaj instancoj pri la okazintaĵoj.

La trompiteco fontis ankaŭ el tio, ke la publiko atendis pli multon de la teamo ol ĝi kapablis plenumi. Pro tio „kulpas" ankaŭ Mezey, kiu elformis bonan nacian teamon, malgraŭ la relative malalta nivelo de la hungara futbalo. Li ellaboris tre efikan taktikon, kies ĉefa trajto estis, ke la hungaraj avanuloj kaj halfoj perdinte la pilkon tuj komencis ataki la kontraŭulojn, eĉ se ili estis malproksime de la hungara golejo. Ĉi tiu taktiko portis plurajn sukcesojn por la Mezey-teamo: lia selekta grupo ĝi superis la teamojn de Nederlando, Aŭstrio kaj Cipro, kaj senprobleme eniris la 24 membran partoprenantaron de la Meksikia mondĉampionado. Krom tio la plej brila sukceso estis — malpli ol tri monatojn antaŭ la mondĉampionado — la 3-0-a venko kontraŭ Brazilo. Kvankam el la brazila teamo ĉikaze mankis kelkaj mondfamaj ludistoj, tiu rezulto estis tre bela. Ankaŭ el la hungara teamo mankis gravaj membro

Meksikio, 1986: la unua soveta golo en la hungara golujo – ĝin sekvis kvin pliaj

roj. Tri el ili estis ĵus operaciitaj, du devis trapasi spinoperacion. Multaj pensis — verŝajne ne tute senbaze —, ke pluraj vundiĝoj, spinproblemoj ekestis, ĉar dum la vintra prepariĝo la anoj de la nacia teamo estis multe pli forte ŝarĝitaj ol kutime.

Ĉu temis en Meksikio pri fizika aŭ psika kolapso, ĉu pri ambaŭ? Ĉu okazis iaj fuŝoj dum la prepariĝoj? Ĉu la taktiko estis malbona? Kiomgrade malhelpis la teamon la diversaj konfliktoj ĉirkaŭ ĝi? Pri tiuj ĉi demandoj oni multe diskutos ankaŭ estonte. Sed ŝajnas, ke la ĉefa kaŭzo de la malsukceso estas, ke la hungara futbalo jam ne plu estas tia, kia ĝi estis antaŭ jardekoj. Mezey kaj aliaj talentaj homoj povas fari nur provizorajn miraklojn.

La hungara nacia teamo dufoje atingis la finalon de la mondĉampionado. Unue en 1938, kiam ĝi malvenkis je 4-2 kontraŭ Italio. Pro la malvenko oni akre kondamnis la ĉeftrejniston, kiu ne enmetis tri ludistojn favoratajn de la publiko. Multe pli grandan eĥon vekis la malvenko en la finalo de la Svislanda mondĉampionado. Ĉi tiu estis la sola malvenko de la tiama hungara teamo inter la jaroj 1950-55. El la plej ofte ludinta dekunuo almenaŭ kvin ankaŭ individue apartenis al la plej bonajn ludistoj de la mondo. Ankaŭ la tiama politiko klopodis eluzi la sukcesojn kaj la eksterordinare grandan popularecon de la futbalistoj ŝajnigante, ke la venkoj kontraŭ la okcidentaj sportistoj pruvas ankaŭ la superecon de nia sociordo. Tiam iĝis konata la kanto de la infanĥoro de la Radio: „Nia koro por vi batas, heroa teamo, ni kune batalas por komuna celo." La mondĉampionado komenciĝis brile por la hungaroj: 9-0 kontraŭ Korea Respubliko, 8-3 kontraŭ Federacia Respubliko Germanio. Sepp Herberger, la ĉeftrejnisto de la germanoj tre lerte taktikumis. Li starigis sian teamon sen ĝiaj plej bonaj ludistoj kontraŭ la hungaroj. Malgraŭ la malvenko ili povis daŭrigi sian partoprenon en la mondĉampionado kaj ludante kun relative malfortaj kontraŭuloj ili facile atingis la finalon. La hungara teamo devis venki kontraŭ ambaŭ partoprenantoj de la antaŭa mondĉampionada finalo: Urugvajo kaj Brazilo. Ĉar la germana defendanto, Liebrich vundis la kapitanon de la hungara teamo, Ferenc Puskás, sen li devis ludi la hungaroj kontraŭ la sudamerikanoj. En la finalo li denove partoprenis, sed plej verŝajne nur duone sane. Vane akiris du golojn la hungara teamo, la germanoj sukcesis ne nur egaligi, sed ankaŭ gajni je 3-2. La „heroa teamo" devis enŝteliĝi en Budapeŝton, pro la kolerego de la publiko. Laŭ la publika opinio la malsukceson kaŭzis la stultaĵoj de la ĉeftrejnisto kaj tio, ke la teamo intence malvenkis, ĉar ĝi estis subaĉetita. Oni ne volis ak-



György Mezey, estro de la hungara futbalteamo, kiu post la katastrofa Meksikia spektaklo kun oficiala permeso „fuĝis" al Kuvajto



Antal Végh, kiu per sia furore vendita libro estis la sola persono, profitinta el la Meksikia malsukceso

cepti la fakton, ke tiun tagon, la 4-an de julio en 1954 la germanoj pli bone ludis ol nia dekunuo.

Ĉirkaŭ en 1955 naskiĝis kanto, kiu mokete nomis Hungarion „Futboljo". Sed en la kvindekaj jaroj ne nur la piedpilkado okupis tre gravan rolon en la socio, ankaŭ aliaj sportaj brancoj floris. En 1952 dum la Olimpikaj Ludoj Hungario gajnis 16 orajn medalojn, nur Sovetio kaj Usono superis ĉi tiun rezulton. La hungaraj sportistoj neniam povis ripeti la atingaĵojn de la kvindekaj jaroj. Inter la kaŭzoj troviĝas, ke multe pli da landoj partoprenas nun en la internaciaj konkursoj ol antaŭ 30-35 jaroj. Aliflanke en kelkaj evoluintaj landoj la scienco ellaboris „teknologion", per kio oni povas serie fabriki ĉampionojn, kaj per la tradiciaj metodoj oni apenaŭ povas konkursi kun ili. Krom tio en Hungario ĉiam malpli da gejunuloj planas por si sportan karieron. En la kvindekaj jaroj la sportaj sukcesoj donis tre gravajn avantaĝojn por tiuj, kiuj akiris ilin. Laŭ la plurloke aperinta anekdoto la nacia piedpilka teamo, kiam ĝi en 1953 venkis kontraŭ Anglio pleje profitis el tio, ke reveninte el Londono sen dogana kontrolo povis enporti varojn, en Hungario ne troveblajn. Laŭ onidiroj en la trajno aparta vagono estis destinita por la bonkvalitaj virinaj nilonaj ŝtrumpoj, kiujn ili aĉetis en Londono. En la lastaj jardekoj la situacio multe ŝanĝiĝis en Hungario. Jam ne plu devas esti sportisto tiu, kiu volas ofte vojaĝi eksterlanden, kaj per multaj alitipaj karieroj oni povas krei pli bonajn vivkondiĉojn ol la sportistoj. Certe ankaŭ tio kaŭzis, ke pluraj, kiuj havus veran talenton por iu sporto, prefere elektas alian, malpli sinoferan karieron. En Hungario en 1953 troviĝis 151.000 futbalistoj, nun estas nur 65.000.

En nia lando konstante malkreskas la nombro de la publiko de la matĉoj kaj la aliaj sportaj konkursoj, sed ĉiam altiĝas la interesiĝo, se temas pri ia grava, internacia evento, kun la partopreno de hungaroj. Certe ne estas nur hungara fenomeno, ke la popolo volas esti fiera je siaj sportistoj. Eĉ tiuj landoj, kies ekonomiaj kaj aliaj rezultoj estas respektindaj volas havi sportajn heroojn, kia ekz. Boris Becker estas por siaj samlandanoj. Aliflanke ni, hungaroj post la sportaj malvenkoj iom post iom konvinkiĝos, ke ne indas trotaksi ĉi tiujn sukcesojn, nek la malsukcesojn. Ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi artikolo povas havi la saman opinion. Diego Maradona diris al ĵurnalisto de „World Soccer": „La futbalo savas nenion. La prezoj en Argentino ne malaltiĝis post nia sukceso en Meksikio. Se nia venko nur iomete plibonigintus la sociajn cirkonstancojn, mi tuj reirus al Argentino".

Pál Felső

PANORAMO

Hungaraj-Kanadaj kontaktoj

Komence de majo vizitis Budapeŝton Joe Clark, Kanada ministro pri eksteraj rilatoj, laŭ la invito de sia hungara kolego, d-ro Péter Várkonyi. La geografia distanco inter Kanado kaj Hungario estas granda, sed la malproksimeco ne povas malhelpi la daŭran disvolviĝon de la kontaktoj ekonomiaj, kulturaj kaj politikaj inter la du landoj. Sur nia foto: György Lázár, hungara ĉefministro (dekstre) akceptas Joe Clark.

La Juda Monda Kongreso en Budapeŝto

Komence de majo kunsidis en Budapeŝto la Plenumkomitato de la internacia juda organizaĵo Juda Monda Kongreso. En la inaŭgura kunsido nome de la hungara registaro salutis la partoprenantojn ŝtatsekretario Imre Miklós, prezidanto de la Hungara Ŝtata Eklezia Oficejo.

Estas menciinde, ke la Plenumkomitato de tiu ĉi organizaĵo kunsidas la unuan fojon en socialisma lando. Sur nia foto: en la inaŭgura kunsido parolas Edgar Bronfman, prezidanto de la Monda Juda Kongreso.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

Vasarely-muzeo

En la plej bela baroka konstruaĵo de la hungara ĉefurbo, en la Kastelo Zichy (troviĝanta en la distrikto Óbuda), baldaŭ malfermiĝos muzeo prezentanta la verkaron de la tutmonde konata hungardevena itala penstristo kaj skulptisto Victor Vasarely. Vasarely tenas tre intimajn kontaktojn kun sia naskolando: li donacis plurajn siajn verkojn al Hungario, kaj ofte li gastas ĉe ni.



Nova sidejo de HEA

Meze de aprilo Hungara Esperanto-Asocio forlasis sian sidejon en la strato Kenyérmező (okupitan antaŭ pli ol 20 jaeroj) por transloĝiĝi al nova oficejo – pli ol duoble pli granda – en la historia kvartalo de Budapeŝto. La membraro esperas, ke la nova oficejo faros pli efika la agadon de la Asocio. Sur nia foto: la konstruaĵo, en kiu troviĝas la nova oficejo. (Foto de Z. Fejér.)

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

TRAKIS
BUDAPEST

La INDUSTRIA RENTGENA APARATO
estas moderna ilo de la material-ekzamenado:

La maŝinojn produktitajn de TRAKIS karakterizas:
– MALGRANDA PEZO
– Granda kapablo
– Simpla manipulado
– Fidindeco
– Malaltaj prezoj



Produktas: TRAKIS, H-1441 Budapest VII., Nefelejcs u. 3.
Telefono: (36-1) 221-459, Telekso: 22-4730

REVUO DE REVUOJ

Printempe de nia Jubilea Jaro jam bone videblas, ke nia gazetaro firme refreŝiĝas! Bonŝance, mi devas diri, ĉar niaj vicoj ĉie ajn forte bezonas kaj legaĵojn, kaj interligajn informojn. Por la uzantoj de lingvo *internacia* daŭre necesas fortikigo, unuavice la konigo *pri la aliuloj,* pri la spirita kolegaro aliloke kaj alilande.

Feliĉe, oni povus nun diri, ke la flugila ĉevalo Pegazo salte ekrajdis kun niaj redaktoroj. Tre legindaj kaj pripensindaj revu-eroj troveblas dise en la alveninta revuaro, verŝajne bonvene tiklantaj la legosoifon de la publiko. Malfacilas elstarigi iujn!

Kvankam ĉiuj meritus tion el la *centa* numero de LITERATURA FOIRO. Dum ĝiaj 17 jaroj kolektiĝis tie elita kunlaborantaro, fidele leganta tendaro ĉirka-e, ne laste pro la varia-alloga redaktado de la numeroj. Aparte plaĉis la instruo de la sprita „uverturo" versa de Serĝo Elgo, plende al la ne-malofta ekstera neglekto pri la valoroj de Eo. Ĉu ni digestu tion filozofie? – ŝajne preferindas. Ja, la altajn kapablojn de Eo ree prezentas surpriza fragmento de „nova" Peneter-a ĉefverko, pli erotika kaj superba ol liaj iamaj „idoj"... Aperu kiel eble baldaŭ ties plena eldono en inda libroformo!

Kun nia centjariĝo simile koincidas same *centa* numero de KONTAKTO. Kvankam maturiĝanta, nia junulara revuo ĝenerale montris dorson al movadaj aferoj, vid-al-vide la mondajn problemojn kaj interesĵojn traktante. Kiel malfacile tio eblis, tion konfesas intimvoĉe kelkaj iamaj redaktoroj (ilia plena listo envicigas aron da jam famiĝintaj movaduloj) el la brava pasinteco preskaŭ kvaronjarcenta. Apud ĉarmaj postkulisaj aferoj ni legis pri la redaktaj ondadoj kaj entuziasmiĝojn ĉiam laŭ la novaj generaciaj fervoroj.

Kiel ajn impona cifero estas la cento, la progreso bezonas ankaŭ la komencajn numerojn. Denove aperas tutlanda gazeto apud la regionaj ligiloj: JUGOSLAVIA STELO (n-ro 0) esperigas per moderna formo kaj multrilataj artikoloj, ankaŭ nacilingve. Novan elanon, fortan unuecon celas JEL paŝante al la dua jarcento. Tute novan veston surprenis en Nederlando la komuna gazeto de la movado. Ne sole en la nomo: LA FENOMENO (1.), ankaŭ per integritaj rubrikoj laŭaferaj (kaj ne laŭasociaj) la organo rejuniĝis. Tial mi devas konsenti kun la simpatia triopa redaktoraro: „nova gazeto" naskiĝis, kies gvidliniojn la nacilingva gvidartikolo klare kaj resolute esprimas, pro kaj por la fenomena evento de Eo. Enhave elstaras la eseo, (de van Themaat), kiu komparas E-on kun la revivigo de la hebrea lingvo.

Tre abundan materialon prezentas la GDR-eldono de PACO, ankaŭ per beletraj eroj. Sed mi preferis legi pri aferoj de Unesko, ankaŭ pere de intervjuo kun Amadou M'Bow, ĝia ĝenerala direktoro. Li prudente desegnis la kampanjon kontraŭ Unesko, metodojn de la „libere" falsantaj, mensogaj kaj prisilentantaj amaskomunikiloj. Sed Unesko eltenis ĉiujn premojn, kaj evoluis tutmonda kampanjo por subteni ĝin. Pro gravaj eraroj en la „Senlegenda biografio de Zamenhof" realisma studo kritikas ties aŭtoron (Ito Kanzi) kun la pruvoj pri la optimisma kaj progreson servanta humanismo de Zamenhof.

Kia plezuro aŭdi niajn infanojn paroli-kanti Esperante! La plurlingveco hejme forte progresigas la infanan intelekton, sekve la gepatra ĝojo ŝvelas. Ilia kreskado alportas eventuale zorgojn, certe venkeblajn, sed edukantoj povas kolekti spertojn ankaŭ de aliaj familioj. Facile, ĉar E-aj familioj volonte renkontiĝas, kunvenas en tendaroj; pri tiaj spertoj POLA ESPERANTISTO (4.) publikigis grandan bukedon. Estus inde, ĉu ne, pli subteni tiun movadeton, kiu povas liveri gravajn argumentojn por nia afero. Laŭ mia modesta opinio la strebado en tiu sfero, la familia uzado, tiu rolo de Eo vere konformas ankaŭ al la jubileaj konsiloj de la grandsperta *Zhang Qicheng* (EL POPOLA ĈINIO, 4.): kvante kaj kvalite plialtigi la aplikadon de nia lingvo!

Ĉu en FRG oni revenos al sia propra germana karaktero kaj kulturo disde la Usona? – jen pesimisma plendo en demanda formo de *Stefan Maul* (MONATO, 2.). Pro la konsumisma superrega inundo de la Usoneca vivmaniero okazis tie kvazaŭ Usona koloniiĝo, sed libervole. Tiu lasas (pli ĝuste: igas) eĉ la germanan lingvon degeneri, samtiel la meritan kulturon. Angliĝo furiozas, elgermaniĝo detruas – deprimite maltrankvilas la ĵurnalisto, pro la troa fremda dependeco. Tro preme efikas ĉio ĉi kompreneble al Eo, kiu per si mem kontraŭe trovas sin. Sed ĉu estos kiuj trovos *ĝin?*

Kiel civilizitaj estas *ni,* francoj! – fieras hungara nobelo, en LA GAZETO (8.) eldonata en Francujo, reflektante al la amare-humura artikolo de V. Benczik en HV(1986): „Mi relegis La Grandan Kaldronon". La aŭtoro de la nomita artikolo certe sentas admiron al la franca civilizo (kiun admiron eble tamen kontestus miloj kaj dekmiloj en Alĝerio aŭ Malgasio!), sed li daŭre ne kapablas kompreni, kial la propono de la hungara registaro likvidi la viz-devigon renkontas surdajn orelojn ĉe NATO-landoj? La sama aŭtoro en LA GAZETO reflektas ankaŭ al alia artikolo „Jubileas partio", kiun li atribuas (cetere prave) al V. Benczik. La reflekto estas „rimarkinde realisma" en la kutima frazeologio de la okcidenta gazetaro, sed diable tiklas nian scivolon, de kie prenas sian informon „E.d.Z.", ke laŭ „la lastaj preskaŭ liberaj balotadoj en Hungario" 75 % de la civitanoj apartenas al la „nesovetiismaj fortoj"? Tiuj balotadoj ja rezultigis la reelektiĝon de aro da politikaj gvidantoj kun voĉoj „por" super 90 %...

Ervin Fenyvesi

Unu poemo - en du tradukoj

Miklós Radnóti:
(1909-1944)

HIMNO PRI LA PACO

Esper' pasema, fea lum'! Dum kuraj
jarcentoj estas rara vi donac',
entuziasme, per parol' sonora
mi benis vin, ho, facilpaŝa pac'.

Mi benus vin eĉ nun, vi kien iris
el tiu vintro, kiu laŭdas vin,
dum glavojn fajlas kontraŭ koroj — kaj vi!
Simile dormas en la ber' la vin',

samkiel vi en nia sin' kaŝiĝas.
Aperu do! Fantomas praa bild'
pri feliĉuloj, kiuj birde kantis,
sed ve, forgesis kanti ni kun bird'.

Ho marto, venu kun venteta temp'!
Ankoraŭ, vidu, regas frost' matene;
patrin' de l' frostaj arboj: vintra Sun'!
ekspiru varmon al la prujno pene

kaj restu super ni, ĉar trafos frost'
de l' vintro nin en mezo de l' milit',
dum lernas la rezisti febla kor'
per pugno argumenti sen hezit'.

Ni pensas pri l' somer', pri ekverdiĝ' de l'
arbar'; — iradi en ĝi estas ĝoj'. —
De branĉ' ne falas la jugland' matura,
ĉar densa estas la ĝarden-odor'!

Sub ora sun' eksaltos pilkoj inter
infanoj kirliĝantaj; en la val'
geknab-kriad' sonoros, sur la kampoj
kun kolharara flagro la ĉeval'

kuregos fluge al falanta Sun'!
Kaj super ni susuros tegmentrand',
hirundaj nestoj malheligos ĝin.
Ĉu vere? Jes! La pac' eĉ trovos nin.

Ĝis tiam, kor', rezistu, ŝirmu vin!

Tradukis: Miklós Fehér

Miklós Radnóti
(1909-1944)

HIMNO PRI LA PACO

Pasema brilo! vi, espero kura,
por jarcentoj bolaj rara graco:
kun vortsonoro, kun adoro kreska
vin mi vokis gracipaŝa paco!

Nun mi denove vokus vin en vintro,
kie pri vi bombastaro ŝtormas,
kaj glavoj gvatas al la koroj — al vi!
En la beroj vino tiel dormas,

kiel vi kaŝas vin en niaj koroj.
Sed dehisku; bildoj, jam malnovaj,
fantomas pri kantbuŝaj feliĉuloj;
sed ve, ĉu ni estas kantipovaj?

Alvenu jam ho, marto de ventetoj!
nun matenoj portas frostojn mornajn,
patrin' de boskoj tremaj: vintra suno,
volvu viajn arbojn prujne dormajn,

kaj haltu ankaŭ super ni frostantaj
en ĉi vintro flama por militi;
kie jam lernas pugno-argumentojn
la animoj ne plu fortaj spiti.

Ni pensas pri someroj kaj promenoj
tra arbaroj sub brancaro reta,
kaj pri aromo densa en ĝardeno,
kie haltas nukso falipreta!

pri oraj tagoj, kiam ĉirkaŭ saltaj
pilkoj brue svarmas infanaroj
kiel bobenoj, kaj tra la vastejoj
flaghararaj, brilaj la ĉevaloj

kuregas al la suno ekfalanta!
Sub alero, super niaj kapoj,
densa hirundarpepado nestos!
Ĉu estos tiel? Jes! Ĉar paco estos.

Animo, spitu ĝis nur fortoj restos!

El la hungara tradukis: Imre Szabó

FERENC GLATZ:

Vojoj novaj kaj malnovaj

(Daŭrigo de artikolo el la antaŭa numero.)

Grava atentigo! Sur la paĝo 52 en la n-ro 1987/2 dum la enpaĝigo kreiĝis ioma kaoso en la unua parto de tiu ĉi artikolo. Por ricevi kompreneblan tekston, oni legu unue la liniojn 9-41 de la dekstra kolumno (*post 1968... la fakto, ke*), poste la plenan maldekstran kolumnon, kaj la liniojn 1-8 de la dekstra (*oni tuŝas... en la urboj*), kaj fine la lastajn tri liniojn de la dekstra kolumno (*kaj la drastan... peza industrio*). Nia enpaĝigisto pardonpetas pro la eraro.

1961-1968. En 1961 la internacia laborista movado travivas skismon. Ĥruŝĉov malkovras la kaŭzojn: la persistadon de la ĉinoj ĉe la stalinismaj principoj, kaj la insistan ĉinan postulon, ke Sovetio cedu al Ĉinio la atomsekreton. Sovetio ne cedis ĝin. Ĥruŝĉov sendependigas sin disde la „ĉina faktoro", kiu dum kelka tempo *kreas favoran klimaton por la reformoj* en la popoldemokratiaj landoj kaj en Sovetio. Oktobro 1961: la 22a kongreso de KPSU revenas al la spirito de la 20a kongreso, kaj detale kritikas la politikajn metodojn de la personkulto, kaj nerekte ankaŭ la gvidantojn de la ĉina partio. La kadavron de Stalin oni forigas el la maŭzoleo. Ĉinio jam komencas kritiki ankaŭ la okcidentajn intertraktojn de Ĥruŝĉov, malaprobas liajn klopodojn por la nuklea malarmado. Nova alternativo en la diskuto: ĉu monda revolucio ĉiupreze, aŭ akomodiĝo al la nova strategia situacio, kreita de la nukleaj armiloj. (Utilus verki artikolon pri la specifaĵoj de la du linioj: la maŭisma evoluo en Ĉinio kondukas al la kultura revolucio proklamita en januaro de 1966, al la slogano „militmesaĝo kontraŭ la mondo", al la kontraŭ-intelektula, „burĝ-likvida" kampanjo; dum per la alia linio Ĥruŝĉov kaj Sovetio rikoltas sukcesojn en la diplomatio — Kubo, germana problemo, ktp.) La kelktempe rapidiĝanta enlanda procezo de senstalinigo en Sovetio nun estas tre malfacile studebla. La samo validas ankaŭ por la popoldemokratiaj landoj. En Bulgario post la 22a kongreso de KPSU oni komencas malkovri la faktojn pri la pli fruaj senleĝaj persekutoj. La komisiono finas sian laboron la 14an de aŭgusto 1962. (Necesus verki apartan artikolon pri tio.) La 14an de oktobro 1964 Ĥruŝĉov estas eksigita. Lin sekvas ĉekape de la partio Breĵnjev, en la ĉefministra seĝo Kosigin — personoj de li „levitaj" al la unua linio de la partia gvidado. Ekzamenenda ŝlosila demando: ĉu la eksigo de Ĥruŝĉov okazis pro liaj senekvilibraj gvidmetodoj, por savi la partion kontraŭ la „pravaj" kritikoj de la heredantoj de la Stalinaj ideoj? Aŭ tiu eksigo intence celis malhelpi la disvastiĝon de la senstalinigo al la partia kaj ŝtata aparatoj, al la tuto de la politika instituciaro? Estas fakto: en tiu tempo naskiĝas politika konceptaro ĝis nun vivanta, kiu jesas la *reformon* en la *ekonomia direktado*, se la stato de la vivnivelo neprigas tion, sed deziras *lasi netuŝita la sistemon de la politikaj institucioj*. Estas same fakto: la reformoj sur ekonomia kampo daŭras ĝis 1968: ekde septembro de 1964 Jugoslavio partoprenas en la laboro de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo (KEI), en januaro de 1965 Ĉeĥoslovakio, en aprilo Hungario, en julio Jugoslavio proklamas la reformon de la ekonomia direktado (t.e. de la supre skizita Stalina strukturo.) Tiun *internaciskale favoran porreforman klimaton* interrompas la aŭtunaj eventoj en Prago dum 1968, kaj la *repremado de la Ĉeĥoslovakiaj reformklopodoj*...

En Hungario dum la jaro 1962 la *reforma tendenco denove akiras gvidan pozicion*. La rehonorigo de la maljuste kondamnitaj personoj (komencita en la jaro 1956) nun finiĝis dank' al la efiko de la 22a kongreso, kaj ĝi ne restis nura rehonorigo. Ĝin akompanis la *startigo de la reformado en la potenc-mekanismo*. (Ebla temo de disertaĵo: historio de la perfort-organoj, interalie de la ministerio pri internaj aferoj, kun aparta atento al la personaro, al la malaltigo de la supra aĝlimo por pensiigo, postulo de universitata diplomo por difinitaj rangoj, la eksigo de personoj, kiuj partoprenis en senleĝaj persekutoj, al la klopodoj por levi la fakan nivelon, al la dislimigo de certaj funkcioj. Ekzemple, oktobre de 1963 la regado de la malliberejoj transiras al la ministerio pri internaj aferoj al la ministerio pri justico ktp.) La 23a de marto 1963: amnestio por la partoprenintoj en la senleĝaj persekutoj dum la kvindekaj jaroj kaj por tiuj, kiuj estis malliberigitaj pro kontraŭŝtata agado inter 1956-62. Nur surbaze de jurhistoria informkolektado eblus difini, kiom ŝanĝiĝas la traktado de la kontraŭŝtataj kaj nepolitikaj krimoj inter 1963-86. Estas malfacile trovi konkretajn indikojn: kiel komencas dissolviĝi la atmosfero de timo devenanta el la ankoraŭ tro proksimaj kvindekaj jaroj, kaj kiel heredigas la timo pro politikaj elpaŝoj aŭ nur hazarde eldiritaj vortoj en la ĉiutaga vivo. Aliflanke estas facile konstatebla fakto: ne plu „malaperas" superaj aŭ mezaj gvidantoj. Tiam komenciĝas en la partia ĵargono la diferencigo: la politikajn diskutojn necesas trakti ne „administre", sed „politike". Tamen, la *preci-*

za jura *reguligo* ankoraŭ *ne okazas.* — Komenciĝas certaj ŝanĝoj en la rilatoj inter partio kaj ŝtato. Sed prefere *nur en la praktiko.* Formuliĝas nur detalaĵoj: ekz. ne-partiano rajtas ricevi ajnan postenon, krom en la partia aparato. (Temo por disertaĵo: pri kiuj aferoj rezoluciis la CK de la partio inter 1963-86? Tipoj de la aferoj. Kiel kaj kiom elformiĝas divido de la laboro inter la partia kaj ŝtata gvidantaroj? Kial malfruas la preciza dislimigo? Necesas aparta ĉapitro por ekzameni la teritoriajn organojn. Nur laborhipotezo: la reformado de la Stalina ŝtatstrukturo sur tiu ĉi tereno progresas malpli facile.)

La avangarda branĉo de la reforma procezo estas la ekonomia politiko. Tio estas natura fenomeno. La kontraŭtezo de la unuflanke potenco-centrisma Stalina konceptaro estas la socio-centremo. János Kádár kaj Rezső Nyers formulis inter 1964-66: ne estas ĝusta la Stalina tezo, laŭ kiu en la socialismo la bezonoj kreskas pli rapide ol la produktado. La hungara ekonomia historiografio jam demonstris, ke la adeptoj de la reformo pledas por la sama afero ekde 1953: prefero de la agrikulturo al la industrio, malpliigo de la subvencioj al la peza industrio, kaj subtenado de la industriaj branĉoj, kiuj rekte servas la konsumadon fare de la loĝantaro. Ĉio ĉi strikte ligiĝas al la reformo de la ekonomia direktado. La ĉefa problemo kompreneble estas la harmonio inter la planekonomio kaj la merkatekonomio. En 1966 János Kádár klare formulas, kion la politika gvidantaro atendas de unu kaj de la alia. Ekonomi-politikistoj deklaras en 1964: anstataŭ la elcentra direktado necesas la memstareco de la entreprenoj. — Tiam *ankoraŭ estas klaraj la starpunktoj de la politika gvidantaro.*— La 9a kongreso de la hungara partio novembro de 1966 promesas, ke la ekonomian reformon akompanos kompleksa reformo de la ŝtata administracio. Citaĵo el la ferma parolado: kontraste al la pli frua centrigo necesas transdoni la decidrajtojn al la lokaj konsilantaroj. — Ĉio ĉi jam povas konduki al la bazoj de la ideologio, inkluzive al la posedorajto. Iom post iom akceptiĝas, ke ne nur ŝtata posedaĵo povas estis socialisma posedaĵo (kiel instruis la Stalina tezo), sed ankaŭ grupa posedaĵo.

El ĉio ĉi sekvas difinita *vivnivel-politiko.* Per kolektado de detalaj indikoj pri la infrastruktura evoluo versajne eblus pruvi, ke la reforma politiko meze de la 60aj jaroj estis *kontraŭtezo de la Stalina principo pri la rilatoj inter la konsum-pretendo kaj la produktemo.* (Laborhipotezo: tiam ekas denove en Hungario politiko por la evoluigo de la publikaj servoj kaj de la mediokulturo. Ĉu ĝia malrapidiĝo komence de la 70aj jaroj kune kun la stopiĝo de la decidita evoluigo de vilaĝoj kaj provincaj urboj estas sekvo de la reformhalto? Aŭ nur tiu de la ekonomia krizo?) Malkonstruiĝas ankaŭ la aŭtarcia politiko. La rompo de la ekonomipolitika izoliĝemo kompreneble signifas turniĝon al la socialismaj landoj. Kvankam necesas ampleksa kolektado de faktoj ankaŭ sur tiu ĉi kampo, estas klare, ke la gvidantoj de la reformpolitiko kredis en la perspektiva funkciado de KEI. Ankaŭ la historio pruvis, ke foje jam ekzistis simila „natura" merkata kaj produkta komunumo, la Aŭstra-Hungara Monarkio, kiam utile renkontiĝis la krudmaterialoj kaj laborfortoj de la mez-Eŭropa teritorio. Nun la fono estis Sovetio kun ĝiaj ŝajne neelĉerpeblaj krudmaterialoj, ĉefe la nafto kaj tergaso. Inter 1962-69 ankaŭ politike ŝajnas dissolviĝi la izoliĝemo de la socialismaj landoj. Inter 1963-66 sinsekve estas enkondukataj faciligoj koncerne la individuajn vojaĝojn de civitanoj, al Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio kaj iom poste al Jugoslavio. En 1961 371 mil hungaroj vojaĝas al eksterlando, en 1964 jam 1,5 milionoj. La ĉefa celo estas la industriiĝanta Ĉeĥoslovakio (vasta privata „importado" de tekstilaĵoj, unuavice de nilonaj ĉemizoj). Al Rumanio oni vojaĝas por viziti parencojn, al Bulgario por ferii ĉemare (ĝi estis ĉefa celo de la unuaj aŭtomobilposedantoj).

Alia avangarda branĉo de la reforma procezo — apud la ekonomia politiko — *estas la ekstera politiko.* Stalin neniam vojaĝis al eksterlando, escepte kiam la mondmilito trudis tion al li. Li forkaŝis sian personecon, li aperis antaŭ la publiko nur okaze de festoj, armeaj paradoj. Ĥruŝĉov ofte vojaĝas, donas intervjuojn, babilas, malkaŝe elmontras sian karakteron, inkluzive ankaŭ ties limojn — je granda ŝokiĝo de la partia aparato, edukita en alia spirito. Kádár rolas publike malpli, sed kun neelĉerpebla energio li pretas vojaĝi ĉien ajn, kaj ankaŭ li parolas improvize. En la okcidentaj landoj tio estas baza antaŭkondiĉo de politika sukceso. Ĉio ĉi metas novajn postulojn al la ekstera politiko interne de la potencmekanismo: tion, ke la personaro de la ministerio pri eksteraj rilatoj kontentigu ne nur la ŝtatsekurecajn postulojn aŭ la bezonojn de la ekstera propagando de la ŝtato, sed ankaŭ la postulojn de la vera diplomatia laboro. (Temo por disertaĵo: ŝanĝoj en la personaro de la hungara diplomatio inter 1949-86, laŭ edukiteco, lingvoscio ktp.) Komenciĝas turismaj vojaĝoj ankaŭ al la okcidentaj landoj. Plejparte enkadre de organizitaj grupoj. Krom la bremsa efiko de la devizaj problemoj hantas ankoraŭ la malnovaj politikaj konceptoj, kiuj vidas la eblon de politika provoko en ĉiu okcidenta vojaĝo. En 1961 44 mil, en 1964 156 mil hungaraj civitanoj vojaĝas al iu okcidenta lando.

En la laborstrukturo de la socio la ĉefa demando estas, kiagrade apud la *ŝtataj* granduzinoj kaj *grupaj* (kooperativaj) produktejoj ricevu lokon la individua produktado, baziĝanta sur *privata* posedaĵo? La baza principo estas klara— „oni ne produktu balailojn en granduzinoj" —, sed en la praktiko apenaŭ ŝanĝiĝas io. Tamen la krizo kaj la manko de varoj eltrudas la ŝanĝojn. En la agrikulturo la „ĉirkaŭdoma agro" (malgranda terpeco, kiun la agrikulturaj kooperativoj cedas por individua uzado al siaj membroj) pruvas la triumfon de la individua produktado. Ankaŭ la tiutempaj statistikoj montras, ke pli ol duono de certaj agrikulturaj produktoj (unuavice de la viando kaj legomoj)

kreiĝas en la „ĉirkaŭdoma produktado". La adeptoj de la reformo kaj tiuj de la malnova politiko ekde 1960 konstante diskutas: kiom la ekonomiaj reguloj favoru la individuan produktadon en la agrikulturo? (Necesus analizi en aparta artikolo, ĉu ne tio estas nia plej granda eraro, ke la diskuto baziĝis sur abstraktaj teorioj ankaŭ koncerne la industrion, sen atento al la naturaj karaktero kaj postuloj de la produktado, laborprocezoj kaj la kvalito de la produktoj?) Inter 1962-74 la agrikulturo ricevas signifan subtenon, kaj per tio metiĝas la bazo de la Hungarlanda „nutraĵ-konsumsocio" (okcidente nomata „gulaŝ-komunismo").

La individua riĉiĝo, la *konkurso alportita de la merkata ekonomio* en la ĉiutaga pensado komencas *malkonstrui la malnovan komunismo-modelon, baziĝantan sur la principoj de egalismo.* Jam ekde 1960 disvolviĝas diskutoj pri la „estonto-bildo" de la socialismo. La baza demando estas: ĉu vere la apero de la individua riĉiĝo kiel celo detruas la senton de kolektivismo, kaj iom post iom kondukas al etburĝeco kaj egoismo? Maltrankvilaj reagoj el pluraj direktoj: iuj timas pro la ebla detruiĝo de la egalisma komunismo-bildo, devenanta el la centjara historio de la laborista movado; aliaj volas konservi la personan puritanecon kiel postulon: sur tiu puritaneco konstruiĝas la Stalina ŝtatismo-koncepto, kiu preskribis ke la individuo povu ricevi la materialajn bezonaĵojn ne per individua vojo, sed pere de la ŝtate kontrolataj produktaj aŭ administraciaj kolektivoj, aŭ rekte kiel ŝtatan „donacon". Eble la plej laŭta grupo de la diskutantoj estas tiu de la verkistoj: ili timas, ke la materiala riĉiĝo rezultigos malpliiĝon de la reproduktiĝo de la hungararo, kaj ankaŭ forturniĝon disde la popolaj-naciaj idealoj. La partio vidas la problemojn solveblaj ne per agitadaj-administraj rimedoj, sed per ideologiaj-teoriaj esploroj. Nova sinteno en la partia politiko. Sed tamen *ne la politika aparato prilaboras la novajn problemojn.* Ne eblas nun respondi, kial ne. La kaŭzon oni povos diri nur surbaze de detalaj konoj pri la 70aj jaroj, kaj ekzamenoj pri tio, kian pezon havis en la politika kaj ideologia aparato la malnovaj fortoj. La avangardon de la reforma pensado konsistigas la artoj, antaŭ ĉio la kinarto (Miklós Jancsó, András Kovács) kaj la literaturo (Gyula Illyés, Tibor Déry, Péter Veres, László Németh, kaj el la nova generacio Endre Fejes, Tibor Cseres, Ferenc Sánta ktp.). Oni povas konstati, ke la *nova kulturpolitiko*, baziĝanta sur la renesanco de la homcentrisma literaturo kaj arto, *fariĝas la tria avangarda branĉo de la reforma procezo.* (Temo por disertaĵo: komparo de la literatura kaj kinarta respeguliĝo de la pola, soveta kaj hungara reformpolitiko inter 1962-86.)

Rimarko koncerne la fontojn: la supre skizitaj faktoj kaj indikoj — prenitaj el la tiutempaj gazetaro, rezolucioj, leĝoj, paroladoj de politikistoj, statistikoj kaj historiografiaj verkoj — nur signas la komencon de *novaj fenomenoj.* Pri ilia validiĝo aŭ *stopiĝo*, pri tio, ĉu prireforman leĝon sekvis konkretaj instrukcioj pri ties realigo, kaj pri tio, kien entute ni alvenis ĝis nun — povos respondi nur la historio de la sepdekaj jaroj. Kompreneble, ankaŭ la ŝanĝojn de tiu periodo ni povos kompreni nur per la studado de la historio de la internacia laborista movado.

Fino de la unua notkajero.

DUA NOTKAJERO
Hezitoj kaj malinklinoj 1969-1984

1969-1984. La 21an de aŭgusto 1968 bulgaraj, polaj, hungaraj, GDR-aj kaj sovetaj taĉmentoj enmarŝas en Ĉeĥoslovakion. La studado de la karaktero de la Ĉeĥoslovakiaj eventoj ĝis nun malfruas. Frapas al ni la okulojn: la reforma movado tie estis multe pli bazita ideologie kaj intelektule, ol en aliaj socialismaj landoj. Ĝi elpaŝis kun la pretendo de nova socialismo-modelo en lando, kie pri la senleĝaj agoj fare de la personkulto oni rezoluciis publike nur en marto de 1968. Post la enmarŝo en la soveta gvidado okazas rigidiĝo. Necesus studi la precizan kialon de tio. Ĉu...

* * *

Ĉi tie mi interrompas la transskribadon de la pensoj el la notkajeroj. La studoj pri la detaloj de la supra skizo povus plenigi plenajn revukajerojn. Pri la „sepdekaj jaroj". Sed tiam kial mi direktas al la historio de la sesdekaj jaroj tiujn, kiuj faras demandojn pri aktualaj problemoj nun, somere de 1986? Jen kelkaj ĉapitrotitoloj el la notkajeroj, formulitaj en formo de demandoj. Ne por respondi, nur por pensigi...

„La kontinueco de la reforma politiko estas demonstrebla ankaŭ post 1968. Sed ĉu la *rigidiĝo okazinta* en la socialismaj landoj kaŭzis tion, ke la *hezitoj kaj malinklinoj* en Hungario *daŭras plu*: en 1974 la kontraŭuloj de la reformoj refortiĝas, kaj en 1979, pro la ekonomiaj malfaciloj la adeptoj de la reformo parte ŝajnas reakiri la poziciojn...?

„Ĉu la fakto, ke la Hungarlanda reformpolitiko restis preskaŭ sola interne de la tendaro inter 1968-83, ne estas rigardebla kiel la kaŭzo de la *praktikismo de la hungara reformpolitiko?* Ĉu eble la hungara politiko tiel defendas la reformon, ke ĝi *ne formulas ties konsekvencojn en la ideologio kaj politika teorio,* kiuj kondukus al *desegno de nova socialismo-modelo, diferenca disde la malnova.*"

„Ĉu ne tiu ĉi senideologieco estas la plej granda interna malfortaĵo de la hungara reformo? Ja ĝi *ne povas prilabori* la — eble pravajn, eble malpravajn — *kontraŭargumentojn de la diskutpartneroj,* kaj utiligi tiujn! Kaj ĝi ne povas klare prezenti al la civitanoj — intelektuloj, laboristoj ktp. —, *el kiaj alternativoj povas elekti* la hungara gvidantaro kaj la hungara socio?..."

Ĉu ne la fakto, ke la reforma movado de la sesdekaj jaroj evoluis inter daŭraj trudataj hezitoj kaj malinklinoj, konservis la *duvizaĝan politikan sistemon,* jam elformiĝintan ĝis la sesdekaj jaroj? La miksaĵon de du aferoj: tiun

Superrigarde al hejma Esperanto

Foje esperantistoj estas devigataj partopreni en „dufronta batalo", krom la nekomprenema ekstera mondo ili alfrontas eĉ siajn spitemajn familianojn. Pri movada pioniro, Jenő Forster, kasisto de Hungara Esperanto-Asocio oni notis, ke „pro Esperanto li ofte ne zorgis pri sia propra tajlora negoco, kio kaŭzis multan ĉagrenon al lia familio". Ne nur la unuajn historiajn jardekojn karakterizas similaj okazintaĵoj. Monatojn antaŭ la centjariĝo mondvojaĝantoj plendis, ke „Pasporta Servo" eĉ en Hungario eventuale ne servas: foje juna edzo ne lasis al ili trapasi lian sojlon hejman pro furioza koleremo de la edzino al esperantistoj.

Tamen estus ne prudente akcepti starpunkton, ke la intelekta kampo de homo estas facile disparceligebla je du-tri apartaj teritorioj, laŭ lingvoj. Lastfoje ekzemple oratoro emfazis dum la Hispana Kongreso de Esperanto (1986), ke estas tute normale se la gepatra lingvo (nome la galega) utilas nur hejme, landnivele la hispana, internacie Esperanto. Estus vere erare supozi, ke Esperanto povas fariĝi plena lingvo, se ĝi restas ekster la hejmo kaj familio. Ne, ĝi ne estas veneno de la familia harmonio. Ĝenerale ne Esperanto eksplodigas militon inter familianoj, ĝi estas nur preteksto, la veraj konflikto-faktoroj kuŝas kaŝite en la profundaj homaj interrilatoj.

Eblas facile trovi pruvojn, ke oni alproprigas grandparte la Internacian Lingvon ne en lernejoj, ne en lingvo-kursoj, sed tre ofte aŭtodidakte, hejme. En lernejoj la plej fortaj motivoj, kiuj igas infanojn lerni Esperanton, devenas el familio. Al infano nenio gravas pli ol la opinio, aprobo, admono de la gepatroj; la sekvindaj ekzemploj de parencoj, amikoj, konatoj.

Jam Zamenhof konstatis: „Lingvo Internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tiu kazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptas ĝin kiel sian lingvon familian, heredan". Efektive la unua esperantista familio estis la lia kaj verŝajne tie okazis unuafoje Esperanta interparolado; Felikso Zamenhof sciis ja la eltrovaĵon de sia frato jam antaŭ la esperantistiĝo de Antoni Grabowski. Estas konate, ke en lia familio estis almenaŭ 6-7 aktivaj, eĉ elstaraj esperantistoj, kies nomoj pro propraj meritoj brilas en la movada historio.

Simila familia engaĝiĝo okazis ĉe pluraj pioniroj. Sveda junulo, Valdemar B. Langlet — la unua esperantista vojaĝanto — fondis esperantistan familion: li edzinigis finnan esperantistinon, post ŝia morto lia dua edzino fariĝis la filino de Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko, eminentulo al kiu estis adresita la fama letero de Zamenhof pri la deveno de Esperanto. Cetere siatempe ankaŭ Borovko edziĝis al esperantistino el Peterburgo, kien li translokiĝis el Odeso. Alia vojaĝemulo — Inocente Serišev, grek-ortodoksa pastro el Siberio — esperantistigis sian tutan familion. En 1910 kun fratino li rondvojaĝis kaj fervore propagandis en 13 Eŭropaj landoj. La fratino mem, Varvara N. Serŝiev famiĝis kiel instruistino kaj aŭtoro de porinfana lernilo „Verda Steleto".

Sendube ĉiam ekzistis pure „predikema tendenco", sed samtempe ekzistis ankaŭ homoj, eĉ ĉekomence, kiel Théophile Rousseau — iniciatanto

›

›

de la ŝtat- kaj kontrol-centrigita instituciaro, naskiĝinta en 1949, kaj tiun de la reformpolitiko, baziĝanta sur konstruado de malsupre, sur fortoj kapablaj formi novajn, naturajn kolektivojn."

„Ĉu ne nia malkapablo por klarigaj-purigaj diskutoj dum la lastaj 15 jaroj estas la kaŭzo de la nuna *laborорganiza krizo*? Ĉu ni difinis la diferencon inter la rajto por laboro kaj rajto por la nuna posteno, aŭ ĉu difiniĝis la rilatoj inter la salajro kaj la plenumita laboro? Ĉu ni rekonis la senutilecon de tiu politiko, kiu volas elformi la kadrojn de la organizado de la laboro *ne laŭ la natura karaktero de la laborprocezo*, sed laŭ *senbazaj teoriaj hipotezoj de personoj, neniam partoprenintaj en la koncerna laborprocezo?* Kaj ĉu ni rimarkas, ke homoj ĝenerale elformas siajn rilatojn al la ŝtato ne surbaze de propagandaj artikoloj aperantaj en la gazetaro, sed laŭ tio, *ĉu dum sia ĉiutaga laboro ili trovas sian lokon en la socia laborорganizo aŭ ne?*"

Demandoj kondukantaj al la nuno, sed originantaj en la historio de la „sesdekaj jaroj"...

Tradukis: V. Benczik

de Esperanto-Oficejoj, kiuj kondukis al la kreo de UEA — kiu tre frue „komprenis, ke Esperanto devas esti enkondukata en la ĉiutagan vivon." Tiel okazis en la barona familio Menu de Ménil: Félicien komponis la melodion de la himno; la edzino, Sophie Marie-Aline verkis valoran libron „La Morala Eduko de la popola infano"; unu helpante al la alia ili kunlaboris en la plej diversaj poresperantaj agadoj.

Teo Jung estas taksata la unua homo, kiu gajnis sian pension per profesia Esperanto-laboro, lin esperantista fratino helpis hejme, poste edzino kiel kunlaborantino. Por labori venis ankaŭ amikoj, inter ili Jean Forge (Fethke) — verkisto kaj filmreĝisoro. En la familio Fethke tri fratoj akiris internacie taksatajn meritojn per pormovada aktivado.

Kie iom disvastiĝis Esperanto, en ĉiuj landoj abundas similaj ekzemploj. Hungaro, Elek Tolnai kun edzino kaj apenaŭ 13 jara filino esperantigis 9 parencojn. Prelato Giesswein eĉ „dum sia lasta vespero nstruis Esperanton al sia parencino".

Multaj semoj perdiĝas, multaj falas sur fekundan grundon kaj Esperanto de generacio al generacio tamen restas en la familio. Ĵus forpasis (en 1986) d-ro Artur Bormann, honora membro de UEA, kiu antaŭlonge konvinkiĝis pri la graveco de la socia kunvivado de esperantistoj; la familianoj plu aktivas, jam la tria generacio akiras indan internacian renomon — al tiu ĉi eminenta pioniro — en lia familio.

Efektive ne tre valorus la sekvindaj ekzemploj, kiujn faris elstaruloj, se simile ne agus esence pli multaj personoj el la mezaj kaj subaj tavoloj de la esperantista popolo. Foje ili surprizas la publikon per ne atenditaj rekordoj. En 1986 la familio Quispel el Nederlando gastadis ĉe familio Bánfy en Hungario, pro baptofesto okazigita de hungaroj. Naskiĝis nepo, espereble baldaŭ esperantistiĝos la reprezentanto de la tria generacio. Esperanto en ambaŭ familioj rolas jam iom pli ol 35 jarojn.

Male al supozoj la plej altnivela enfamilia apliko de Esperanto, la denaska esperantismo limiĝas nek al movada elito, nek al internaciaj geedziĝoj. Ĝi ekfloris en la meza tavolo. Kompare al internaciaj geedziĝoj tiu ĉi fenomeno iom postrestis. En la familio Zamenhof ankaŭ ne estis denaska esperantisto. Lidija, la plej juna filino estis jam 9 jara, kiam ŝi komencis lerni Esperanton. Oni supozas, ke la unuaj denaskaj esperantistoj estis la gefiloj de M. C. Butler, angla kvakero kaj vegetarano, sekretario de BEA dum kelkaj jaroj; li mem esperantistiĝis nur en 1905. Enciklopedio de Esperanto enhavas indikojn, ke en la familio de d-ro Isidoro Fels, prezidanto de loka grupo en Lwów „la infanoj parolis Esperanton antaŭ ol sian gepatran lingvon." D-ro Fels estis 14 jarojn pli aĝa ol M. C. Butler.

Hungara inĝeniero d-ro Miklós Bánó esperantistiĝis en 1911, ankaŭ lia filino trijara paroletis Esperante. Post la unua mondmilito Teo Jung renkontis 4 jaran knabinon en Barcelono — en la familio de s-ano Coll — kiu alparolis lin Esperante. „Esperanto en Perspektivo" jam konstatis, ke „hodiaŭ ekzistas minimume 200 infanoj aŭ junuloj en pli ol 19 landoj, kies hejma lingvo estas Esperanto."

Malgraŭ la multiĝo de internaciaj geedziĝoj — laŭ esploro de japanoj — ankaŭ nuntempe apenaŭ kreskas la nombro de denaskuloj. Kredeble oni timas pro ne ekzistanta, sed supozita troŝarĝiteco de la infano, oni inklinas helpi al infano eviti duoblan diskriminacion, kio ne nepre elformiĝas. Oni erare supozas — kiel tre multaj aliaj esperantistoj —, ke bona ŝanco je alproprigo de Esperanto — helpe de gepatroj — longdaŭre restas por la infano. Laŭ ĝenerala opinio, dum adoleskiĝo — kiam oni libervole, konscie povas jam okupiĝi pri lingvoj — ankoraŭ ne estas tro malfrue komenci esperantistigon. Vere ne, se hazarde interplektiĝas optimumaj cirkonstancoj. Sed aktuale ne ĉiuj infanoj estas elstare inteligentaj kaj laboremaj, dum paso de jaroj multaj geedzo-paroj dekutimiĝas hejme paroli Esperanton, se rompiĝas internaciaj familio-kontaktoj Esperanto ne povas plu havi en la hejmo veran komunikan funkcion.

Esperige kreskis la nombro de esperantistaj familioj dum la intermilitaj jaroj. Oni faris kalkulojn, kiuj—memkomprenebleme — ne povis rilati al geedziĝoj inter samgrupanoj aŭ samnaciajgeesperantistoj.„Enciklopedio de Esperanto" liveras detalojn nur pri internaciaj geedziĝoj. Laŭ statistiko — estas menciitaj 56 geedziĝoj — plej ofte angloj (13), germanoj (12) kaj hungaroj (10) fondis familion per Esperanto. Oni konstatis — danke al sukcesa enketo —, ke „la granda plimulto de la geedzoj uzis Esperanton kiel familian lingvon". Per la geedziĝoj Okcidento „gajnis", Oriento „perdis", preskaŭ 40 familioj loĝis en Okcident-Eŭropo, kelkfoje la nov-geedzoj forlasis la landon de la edzo, respektive tiun de la edzino, ili elektis — por loĝi kaj labori — iun trian landon. Ekzemple la hungaro József Major kun edzino devenanta el Anglio elektis Parizon. Ankaŭ la eksedziĝo tie okazis (cetere oni ne menciis alian eksedziĝon), poste — por propagandi kaj instrui Esperanton, por pli efike labori por Oomoto — li veturis al Japanio.

Preskaŭ la duono (26) de la geedziĝoj okazis en la jaroj de la ekonomia mond-krizo. La mondmilito, poste la fendi-

ĝo de Eŭropo je du blokoj, ankaŭ la pasportaj problemoj multe malhelpis ĉi rilate; pro fermiĝo de certaj landlimoj fariĝis kvazaŭ sensence uzi Esperanton hejme, ĉiam inter samlingvanoj. Sed kiam komenciĝis iom larĝiĝi la vojo de interpopolaj kontaktoj, oni povis sperti rimarkindan multiĝon. Tiun ĉi aserton pruvas porokazaj nomlistoj pri partoprenantoj de familiaj renkontiĝoj, aŭ — kvankam ne senpere — adreso-listoj de „Pasporta Servo". Inter iom pli ol 700 gastigantoj (1986) estas troveblaj 83 foje indikoj pri la hejma parolo de Esperanto. Kun 15 esperantistaj paroj kaj 9 familioj francoj estas ĉe la pinto, en Hungario 6 esperantistaj familioj entreprenis akcepti samideanojn je senpaga gastado. Se oni pripensas, ke „Pasporta Servo" estas entrepreno de TEJO, ankaŭ tion, ke ofte ne nur la gastoj, sed ankaŭ la gastigantoj apartenas al „liberaj homoj", al eksterfamiliaj studentoj, al junaj homoj, kiuj nur poste povos geedziĝi, la proporcio de la familioj — pli ol 10 procentoj — ne povas esti prave taksata sensignife ne grava.

Neniu observis serioze la socian fonon de diplomitoj, ĉirkaŭ 100, kiuj studis esperantologion en la Budapeŝta Sciencuniversitato ELTE, kvankam en tiu tereno la ekzisto de hejma Esperanto estas pli okulfrapa; ekzemple el la departemento Veszprém ĝis nun apartenis al la fako nur „paroj": patro kaj filino, edzo kaj edzino, instruisto kaj lia iama lernantino. La diplomitaj gepatroj edukas dekon da denaskaj esperantistaj infanoj.

Estas malfacile trovi racian klarigon: kial ignoras la organizita Esperanto-movado tiun ĉi — almenaŭ interesan — tavolon de esperantista popolo?

Ĉekomence kiam oni ankoraŭ ne povis fondi klubojn, mankis publikaj ejoj por regulaj kunvenoj, niaj antaŭuloj kolektiĝis en la hejmo mem de iu sinofera esperantisto. La kroniko raportas, ke Norde „la komuna hejmo de Aino Elmi Tamminen kaj Tyyne Leivo, estis gastama renkontejo de en- kaj eksterlandaj samideanoj dum multaj jaroj, kiam kluba vivo en Helsinki ne ekzistis". Oriente la hejmo de geinstruistoj Sasaki funkciis kiel metiejo, la edzo — eminenta esperantologo — okupiĝis pri scienca laboro, la edzino hejme instruis Esperanton, poste ŝi organizis esperantistinan klubon, eble la solan en Japanio. Okcidente en la familio Fauvart-Bastoul patro, patrino kaj filo jam antaŭ la unua mondmilito triope verkis libron „Triope", ili multe helpis al Boirac por kompili la „Plenan Vortaron".

La disvolviĝon spontanean de hejma Esperanto nur lastatempe komencas sekvi konsciaj paŝoj por kolekti, organizi la koncernulojn, oni antaŭe apenaŭ liveris servojn al esperantistaj familioj. Estas jam kelkaj feriejoj aŭ kulturcentroj (Grésillon, La Chaux-de-Fonds) kie ne tre ĝene ariĝas pseŭdoesperantistoj, balbutuloj kaj krokodiloj, sekve ankaŭ tiuj povas bonfarti, kiuj hejme alkutimiĝis al pli altnivela lingvo-uzo ol la kutima. Foje aperadas anoncoj en gazetaro pri „Esperanto-Gastejo", „Mondhejmo" aŭ „Tendumejo Esperantista", kie la lingvo-medio estas kontentiga, konvena eĉ al la plej junaj parolantoj de la internacia lingvo.

Laŭdinda estas la iniciato de Germana Esperanto-Asoio, kiu anoncadas sian „Printempan Semajnon Internacian" „por la tuta familio" kun la celo, ke „la programo kontentigu egalrajte plenkreskulojn kiel la infanojn." „Somera Esperantista Familia Tendaro", proksime al Neubrandenburg, pro sia familieca memprizorgado estas unu el la plej ŝatataj, allogaj kaj bonsukcesaj aranĝaĵoj en Germana Demokratia Respubliko.

Mez-Eŭropanoj jam de jardeko okazigadas specialan aranĝaĵon (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj) kvazaŭ ekskluzive al familioj, precipe al denaskaj esperantistaj etinfanoj. La unuajn du organizis la konata verkisto István Nemere en Pollando, poste sekvis — jaron post jaro — ok, parte en Hungario (5), respektive en Slovakio, Jugoslavio, en 1986 denove en Pollando. La familioj kunvenos en la nuna jubilea jaro en naturprotektata regiono de Hungario: Őrség.

Tiu ĉi eksperimenta entrepreno frape pruvis: infanoj povas samtempe — senpene sed plene — alproprigi du lingvojn, se inter ili unu estas Esperanto. Same gravas alia sperto: la frue akirita lingvo-scio povas esti konservata en la familio — kiu ligiĝas al internacia medio — ĝis adoleskiĝo, kiam la koncernulo jam ne bezonas familian admonon: memstariĝas.

Por interesitoj multiĝas ankaŭ spiritaj nutraĵoj; pri la parolata lingvo far etinfanoj oni faris esplorindajn notojn, surbendigojn, eĉ video-filmon, ankaŭ eseojn. Ne nur malgravuloj, sed ankaŭ internacie konataj aktivuloj. En Hungario longdaŭre esploras la fenomenon de denaska esperantismo profesia lingvisto, d-ro Blazio Wacha, ankaŭ la vicprezidanto de HEA, d-ro Árpád Rátkai; en Kroatio profesía esperantisto, direktoro de Internacia Kultura Servo, Zlatko Tišljar; en Italio iama estrarano de UEA, d-ro Renato Corsetti.

La esplorrezultoj, eĉ la rimarkoj de neesperantistaj lingvistoj, kiuj pro scivolemo vizitis iun familian renkontiĝon, kuraĝigas, pravigas tiujn, kiuj klopodas enhejmigi Esperanton.

Ernő Csiszár

Originala poezio

Mikaelo Ternavski

MONOLOGO DE NORVID

Mi jam venis al vi,
sed vi havas ankoraŭ nokton.
Mi staras ĉe via sojlo
kaj atendas,
kiam tago leviĝos.

Ja, kiam la tago leviĝos,
vi rigardos tra la fenestro
kaj ekvidos,
ke mi jam staras
ĉe via sojlo.

Mi staras ĉe via sojlo,
sed ne frapas la pordon,
ĉar ankoraŭ estas nokto.
Kaj nokte
vi ne rekonus min...

Mi staras kaj atendas,
kiam la tago leviĝos.

Aurel Ponori Thewrewk

LA POEMOJN MI DELASAS

La korpojn de l' filinoj pomporiĉaj
mi nutris kaj mi ilin plenkreskigis,
kiujn koncipis noktoj gravediĝaj.

Maturiĝintajn nun avid-rigardas
barbaroj. Ĉu troviĝas inter miloj,
en kiu pura, ĉasta amo ardas?

Mi vidos ilin plu ne freŝe-flore.
Filinojn miajn kise adiaŭas,
filinojn miajn mi delasas plore.

Imre Szabó

KANTO DE SOPIROJ

Vi forta bordo de amo,
Mi ondas al vi per kantoj
El foroj min renaskantaj,
Vi forta bordo de amo.

Kun gemoplenaj okuloj
Admiris mi viajn mamojn,
Kaj nun mi kaŝas la manojn,
Memoru nur la okuloj.

Vi estas pura mateno,
Mi nur kaduka vespero —
Kaj vere nur la vespero
Sopiras al la mateno.

Bertram Potts

Legu ĝin denove, paĉjo

Mia paĉjo al mi legis en la tempo longe fora
historiojn en la enlitiĝa horo.
Multhumora li ja estis, jen priplora, jen ĝojkora,
kaj min ravis per voĉ-tonoj de aktoro.

„Legu ĝin denove, Paĉjo! " mi kutime pete kriis
kaj ni kune kreve ridis kamarade,
kaj li rolis tiel riĉe, ke vast-vide mi viziis
la fabelo-mondon pasi min parade.

Sur genuo de la paĉjo mi aŭskultis streĉ-atente,
dum mi sekvis ĉiun spir-haltigan vorton.
„Legu ĝin denove, Paĉjo! " Li karesis min senplende
kaj elporṭis plen-akorde sian sorton.

Povas esti, ke li ekvojaĝis sur memoro-maro
kaj refoje tra la junaj jaroj drivis.
Tiuhore ni fariĝi ĝoja infaneto-paro,
tiel simpatie ni kor-vibre vivis.

LÁSZLÓ LACZÓ:

La graveco de la fridigo

Kamparanoj kaj dommastrinoj jam depost jarmiloj „lernis" — memkompreneble post pli-malpli hazardaj spertoj — ke en la keloj, do sub la tero, daŭras la malvarmo, kaj la putri kapablaj agrokulturaj produktaĵoj tie longe gardas siajn originalajn ecojn. En la historio de la homaro propran ĉapitron — kaj surprize gravan — okupas la egaj klopodoj ŝirmi la malfacile produktitajn aŭ pene akiritajn nutraĵojn disde la etaj bestoj kaj de la natura difektiĝo. La inventemon de nia homa raso oni devas admiri tiurilate tra la tuta historio. Ja, mem la naturo devige instigis la popolojn ĉie ajn, trovi pli kaj pli konvenajn metodojn por ke ne perdiĝu la elementaj valoroj de la manĝaĵoj.

Laŭ la geografiaj cirkonstancoj, la popoloj ekuzis la plej diversajn metodojn por la konservado de la amasigitaj manĝindaĵoj, kiuj plej ofte servis kiel rezervoj por la propra kuirejo. La timo de la malbonŝanco, ne akiri eventuale predon aŭ rikolton „morgaŭ", ne posedi denove la necesajn manĝaĵojn, forte trudis inventemon por utile konservi ĉion ajn manĝeblan. Estus tro longa la listo de la tiucelaj elementaj manieroj, eltrovitaj ĉe multaj popoloj. Verdire, troviĝas inter tiuj manieroj multaj, kiuj por modernaj homoj ŝajnus tre, eĉ tro malĝustaj... Tamen el la diversaj metodoj ĝis hodiaŭ restis uzeblaj inter aliaj la sekigo, la fumumo, la enbareligo (prefere subtere), la salumo. En nia industria periodo, tiuj estas pli-malpli transprenitaj kiel teknikaj procedoj, plenumataj jam fabrikmaniere, do grandskale.

Aparte utiligebla montriĝis la malvarmigaj metodoj, kiuj aperis taskoj naturaj kaj relative facile plenumeblaj en la malvarmaj zonoj de nia tero. Necesis pli granda inventemo, sed iĝis ankaŭ pli grave en la varmaj regionoj „produkti" malvarmajn cirkonstancojn por la vivgravaj manĝaĵoj. Estas konate, ke oni trovis tiucele ĉie ajn certajn manierojn, ĉu subtere en keloj, grotoj, kavernoj, ĉu surtere sub ŝtonvolboj, eble sub palmofolikovritaj kabanoj, ankaŭ per pli-malpli natura ventumado, kaj tiel plu.

Apartan gravecon donis al la malvarmigo, ke montriĝis pli bongustaj la malvarmigitaj trinkaĵoj kaj iuj ne kuirindaj manĝaĵoj. Abundaj spertoj pruvis al la dommastrinoj kaj al la kuiristoj de la altranguloj, ke male ol ĉe fumado aŭ salumado — la malvarmigo estas la metodo, kiu plej malmulte forprenas de la gustoj, de la ŝatataj ecoj ĉe la tiel konservitaj nutraĵmaterialoj. Tiel iĝis la fridigo la plej bezonata, plej dezirata speco de la nutraĵ-konservado dum la historio.

Ne necesas longe priskribi la triumfan vojon de tiu ĉi metodo, kiu siavice ankaŭ trairis la evoluadon, tiun de la industria revolucio. Se iam oni kolektis vintre glacipecojn por stoki ilin en ŝrankoj aŭ en magazenoj, la rapide kreskintaj nutradbezonoj en la modernaj grandurboj postulis inventi la „malnaturan" glaciproduktadon, la artefaritan glacion. Ĉiu ajn tiucela metodo estis ekuzita, sed la bezonojn de la loĝantaro kaj de la industrio oni ne povis kontentigi. Venis la vico de pli altteknikaj metodoj, kiuj fridigas fakte sen glacio, „nur" per forta malvarmigo de la medio, de la aero...

En preskaŭ ĉiuj industriaj brancoj la fridado nuntempe ricevis gravan lokon. Multfoje oni utiligas ĝin kiel necesan etapon de iu nova teknologio. Ofte tiu industrio havas nenion komunan kun la tradicie fridigon uzantaj brancoj, eĉ tute ne temas pri ia nutraĵo aŭ organika materialo; tamen iom surprize por laikoj, la teknikaj procezoj tie preskribas iaspecan fridigon, almenaŭ gravan malvarmigon. Nuklean energion produktantaj centraloj, ankaŭ laboratoriaj reaktoroj — ekzemple — bezonas plurrilate diversajn fridteknikajn instalaĵojn.

Oni pensu pri la egaj akvoamasoj, kiujn bezonas la atomcentraloj por malvarmigi la funkciantajn instalaĵojn. Oni elpumpas abunde el iu proksima rivero aŭ lago, sed post

„laboro" oni devas ilin refluigi. Venas la nediskutebla problemo pro la medioprotektado! Estas severe malpermesite konduki en la naturajn akvobasenojn, en la riverojn tiel multe da akvo, varmega je 80-100 C° gradoj! Tamen la forkonduko urĝas, kaj malvarmigi la akvoamason preskaŭ ĝis la normala temperaturto de la rivero — ekzemple somere je 25 aŭ 30 C° gradoj — eblas nur per industria fridtekniko. Kvankam tute ne temas pri efektiva frostigo, nur pri rapidega malvarmigo.

Dume tutmonde disvolviĝis grava kaj giganta industrio, kie estas uzata fridtekniko por konservi niajn nutraĵojn. Antaŭ centjaro ĝi komenciĝis en Britujo en la dense loĝataj orientaj regionoj, kie estis instalitaj egaj fridmagazenoj sen la kutimaj glaciŝtipoj. Ili funkciis alimaniere. Temas pri la tiutempe freŝe inventitaj novmanieraj fridigiloj, kies relative etajn parencojn la publiko nun konas jam deproksime. Nome, pro la hejmaj fridujoj, kies ĉefaj tipoj: la absorba kaj la kompresora (laŭ la teknika distingo) prezentis vastan eblon disvolvi la jam tre-tre bezonatajn fridmagazenojn en dimensioj, ĝis tiam ne imagеblaj.

Eĉ malpli imagebla estis antaŭ tiu ĉi fridiga teknologio, la preciza reguligo de la malaltaj temperaturoj. Oni povas, fakte laŭ deziro disponi pri la frostiga klimato interne de la magazenoj, do manipuli pere de malvarmigo, en la vasta senco de la vorto. Novaj kaj novaj malkovroj establis eĉ sciencobranĉon de la fiziko, kiu okupiĝas i.a. pri la efikoj de la malaltaj temperaturoj je la materialoj, kaj precipe je la nutraĵoj.

Dum la esploroj baldaŭ evidentiĝis, ke la vitaminenhavo restas pli granda je malaltaj temperaturoj, ol ĉe alispecaj konservadoj. Frostigado, se ĝi okazas sufiĉe rapide (je 30, eĉ 40 Celsiaj gradoj) efikas interne de la organikaj materialoj (viando) tute alimaniere, komprenu: multe pli favore. Tiel ne kreiĝas glacieroj, do kristaliĝoj, kiuj frakasas la parietojn de la ĉeloj, sekve misas la originalajn histojn kaj malbonigas ankaŭ la guston de la friditaj legomoj kaj fruktoj, eĉ pli, tiun de la viandoj. Per rapida frostigo ĉio ĉi estas evitata, kaj la manĝaĵoj konservas la guston de la freŝa varo, eĉ tiucele uzata frosta temperaturo nepre estas gardenda ankaŭ dum la transportado, ankaŭ en la vendejo. La temperaturo de la frostigo devas efiki al la varo kvazaŭ ĝis la manĝejo, do seninterrompe; alikaze la supremenciitaj favoraj efikoj eventuale fiaskas, la varo povas eĉ grave difektiĝi!

Dum disvolviĝis, kiel menciite, tra la mondo vasta aro de fridmagazenoj kaj alispecaj fridigaj-frostigaj konservigaj fabrikoj, la evoluo kaj modernigo ne preteriris la hejmojn familiajn. Nuntempe la familioj utiligas multe da diverstipaj fridujoj; la gracišranko elmodiĝis kiel superflua kaj ne facile praktikebla ilo. Celante plian frostigon (pri kies ne-interrompinda ĉeno ni supre klarigis) ankaŭ en la hejmaj fridujoj jam troviĝas interne apartaj frostigujoj. Tiuj ebligas hejme konservi freŝe, bonguste la manĝaĵojn, prepari propraguste glaciaĵojn kaj similajn dolĉaĵojn. La dommastrino nuntempe povas reguligi sian frostigilon eĉ je temperaturo de -20 aŭ -25 Celsiaj gradoj, laŭplaĉe; pli frue tion kapablis nur la grandaj fridinstalaĵoj...



Aerfridigilo, tipo TX

En Hungario depost tridek jaroj specialiĝis por fabriki fridigajn teknikaĵojn rekte por la frid-industrio la *Fridteknika Industria Kooperativo.* Tiu entrepreno de fakuloj sukcese disvolviĝis en la internacia konkurado: la produktoj de la Kooperativo estas uzataj vaste tra la mondo, en pli ol dudek landoj.

Dum siaj teknikaj disvoivoj, evoluigante la produktitajn varofamiliojn, restis ĉiam grava vidpunkto: maksimume tipizadi la konstruaĵojn, la aparatojn. Tiu tipizado ebligas bonvene kunmeti, eventuale surloke, la plej komplikajn kaj ampleksajn fridinstalaĵojn, ankaŭ rapide kompletigi kaj grandigi ilian kapaciton. Tio precipe bonvenas, kiam la investantan frid-entreprenon



Nova aerfridigilo de tipo TY



Grandkapabla aefridigilo de tipo TX

oni devas rapide alĝustigi al la ŝanĝiĝantaj postuloj de la merkato, do ebligi produkti pli kaj pli da postulataj friditaj varoj.

La teknikaj manieroj plej modernaj kaj utiligataj de la Kooperativo igas multajn entreprentojn tra la mondo mendi ankaŭ eksterseriajn establaĵojn, laŭ la loke bezonataj specialaj pretendoj. Investantoj ne hezitas mendi kompletajn fridmagazenojn de la multkapabla entrepreno, kiu akceptas komisiojn ankaŭ por efektivigi la muntadon surloke kaj ekfunciigi la liveritan fridinstalaĵon.

Indas ankaŭ por la teknike interesiĝantaj legantoj mencii kelkajn el la produktaĵoj de la Kooperativo.

AERFRIDAJ INSTALAĴOJ

La eksterordinare rapida evoluo de la fridtekniko, de la fridindustrio, igis la Kooperativon produkti kaj liveri laŭ la plej nova teknologio aerfridilojn el ŝtaltuboj kun aluminiaj lamenoj. Tiu aparato vere elstaras pro sia eminenta termokonduktivo, firma korodrezisteco kaj malgranda pezo. Tiuj trajtoj de la instalaĵo ebligas fabriki energioŝparan, malpezan aerfridilon laŭ diversaj tipoj.

La avantaĝoj de la aluminiaj aerfridiloj prezentiĝas ĉe la uzantoj multrilate, ekzemple tiel:

— La fridkapacito altiĝas je 20-60 procentoj (depende de la uzinaj cirkonstancoj) kompare kun la sammaniere konstruita kaj samsurfaca, aerfridilo el zinkizitaj ŝtaltuboj.

— Pro la bona termokonduktivo de la aluminiaj lamenoj, la dementiĝo de prujno, tavoliĝo de glacieroj, okazas pli egaldike ol sur la ŝtalaj lamenoj; rezulte tiu ĉi fridilo funkciigeblas duoble, eĉ trioble pli longe ol la ŝtal-lamenaj.

Montriĝas do mezureble granda ŝparado de elektra energio.

— Dum la funkciado de la aerfridilo, konstante kreskas la diferenco inter la povo de la aluminiaj kaj la ŝtallamenaj aerfridiloj, favore al la aluminiaj. Ekzemple ĉe la ekfunkciigo je 20 procentoj, antaŭ la degeligo je 60 procentoj pli multe plenumas la aluminia aerfridilo, kompare al la ŝtallamena fridilo.

Konsiderante la gigantan elektro-konsumon de la grandaj fridmagazenoj, oni facile konscias, kiel grandan energioŝparon ebligas tiuj aluminiaj aerfridiloj. Laŭ mezuroj en pluraj landoj evidentiĝis, ke ĉe la grandaj konsumantoj la energio-ŝparo dum jaro atinas 30-40 procentojn.

La tipoj de la fabrikataj aerfridiloj bone akomodiĝis al la fridigaj taskoj de la fridindustrio. Por tiuj taskoj oni disvolvis laŭbezone ankaŭ specialajn instalaĵojn. Por krei unuopajn variantojn, la fabrikado kapablas modifi inter aliaj la diametrojn de la ventoliloj, la tubodimensiojn, la fridigan substancon, la distancigon de la ripoj, la degeligan manieron, la enfiksadon de la aparateroj, ktp. Tiamaniere dekmiloj da variantoj estas konstrueblaj por plene kontentigi ĉiujn dezirojn de la mendantoj.

ELVAPORIGAJ KONDENSATOROJ

Relative malgranda elspezo ĉe la investado, kaj ekonomia funkciado karakterizas la elvaporigajn kondensatorojn de la Kooperativo. Laŭ deziro oni liveras ilin kun tubosistemo aŭ zinkizita, aŭ farbita. Oni povas elekti la bezonatan aparaton el inter preskaŭ 20 tipoj de tiu ĉi produktaĵ-familio, kies povoj varias inter 200 kaj 2300 kW. Pro siaj teknikaj parametroj tiuj aparatoj apartenas al la plej bonaj en la monda produktado.

TATA — FREEZE — BELT
rubanda frostigatoro

Tiu instalaĵo konvenas por rapida frostigo de grajnecaj aŭ po-pecaj nutraĵoj, en eminenta kvalito (IQF). Tio signifas, ke post la frostigo la produktaĵo grajnece rulemas, je plezuro de la konsumantoj.

Mem la nova instalaĵo estas eksterordinare multflanka, kio estas artibuebla al la dubenda sistemo. Tiuj bendoj estas cetere reguleblaj aparte, unu sendepende de la alia, kaj dank' al tio, la sama instalaĵo kapablas samgrade plej bone frostigi tre multspecajn legomojn kaj fruktojn: de riboj ĝis maiz-spadikoj (tuboj), de diserigataj legomoj ĝis persikoj, de fragoj ĝis asparagoj. Tiu multkapabla frostigilo estas fabrikata por kapacitoj de 1.5, 2.5, 4 kaj 6 t/h.

TATA — BOXAFREEZE
frostiga tunelo

Tiu ĉi instalaĵo estas konvena por frostigi nutraĵojn, pakitajn en kartonon aŭ skatolon. temas pri vasta gamo de nutraĵoj, tiamaniere frostigeblaj. Tiaj estas ekzemple viandaĵoj, senostigita viando, „hamburger", kortbirdaĵo parte aŭ tute, meleagro, glacikremo, ktp.

La instalaĵo mem transportas interne, ekde la enigo de la varo, ĝisfine, do ĝis la frostiĝon sekva eligo; dum la tuta teknologia procezo sen homa interveno, tute aŭtomate. Ĝi konvene distribuas la skatolojn, denombras kaj grupigas ilin, propre disponante pri la enigo, respektive pri la eligo, respektante la daŭron de la frostigado.

Pro la vasteco de la bezonoj, la instalaĵo estas fabrikata en tre diversaj — 16-18 — grandecoj.

FRID-KOMPAKTOJ

Ties povo diversas inter 7.5 kaj 37 kW. Pere de ili oni



Grajno-fridigilo, movebla, tipo TTH-50

akiras — tre konveve por malgrandaj fridejoj — simple konstruitan, surloke rapide munteblan fridinstalaĵon. Kiel kompletaj unuoj ili estas produktataj — prefabrikataj — por facila transportando.
Ili funkcias tute aŭtomate. Por instali ilin estas bezonata nur malmulte da loko, sed pro parametroj de la funkciado, estante vaste variigeblaj, prezentiĝas multaj utiligebloj en la industrio.

GRAJNO-FRIDILOJ

La plej novaj rezultoj de la agrokulturaj esploroj estas jam utiligataj en tiu nove disvolvita instalaĵo. Multrilataj sciencaj esploroj demonstris, ke oni bezonas sekigi la maizon ĝis la kutima grado — kion oni ĝenerale ankoraŭ faras pro la tradicia maniero de la stokado.

En fridita aero stokante la maizon, oni ŝparas almenaŭ 30 procentojn de la hejtmaterialo (plejofte hejtoleo), kaj krome la internaj valoroj de la maizo eĉ pliboniĝas.

La nominala frid-kapablo atingas 100 tunojn dum 24 horoj, kiam la temperaturo de la ekstera aero estas +23 Celsiaj gradoj, kaj la relativa humideco 65 procenta; la 16 procente humida maizo malvarmiĝas je +10 Celsiaj gradoj.

FRID-TUROJ

Signifan kvanton da akvo eblas ŝpari per tiuj recirkuligaj malvarmigaj turoj ĉe ĉiu ajn procezo, kiu uzas kondukitan akvon por fridigi. La varmiĝintan akvon tiamaniere eblas ree uzi en la menciita procezo — se la varman akvon oni ne utiligas alicele.

La moderna fridtekniko dum sia disvolviĝo postulas respekti du bazajn kriteriojn: **Ekonomieco kaj Mallonga livertempo** — jen la devizoj kiuj efektiviĝas en la servoj!

FRIDTEKNIKA INDUSTRIA KOOPERATIVO

Areso: **H-2890, TATA II., Szomoródi u. 4.**
Telefono: **(34) 80-122**
Telekso: **27-339**

Eksportanto: **KOMPLEX Entrepreno por Ekstera Komerco de Establaĵoj**
Adreso: **H-1807, Budapeŝto, Népköztársaság útja 10.**
Telefono: **(1) 117-010**
Telekso: **225-957**

Tradukis: *Ervin Fenyvesi*

GAJA PAĜO



Kver-kverelo

En la oficejo rabie insultas oficistoj unu la alian.

– Vi! Vi estas la plej stulta iam ajn vidita de mi! – krias la unua.

– La plej impertinenta, vi! Eĉ ne idiota, sed idiata! – ĉias la alia.

– Sed kolegoj! – enpaŝas la ĉefo por pacigi. – Bonvolu ne forgesi, ke ankaŭ mi ĉeestas...

Iom poste

– Do, vi serĉas laborlokon ĉe ni, sinjoro. Ĉu vi havas rekomendon de via antaŭa oficejo? – demandas la personarĉefo.

– Kompreneble. Mia antaŭa ĉefo ja rekomendis al mi serĉi ian alian laborlokon.

Regulo de spegulo

En la viandvendejo oni neniam lanĉas plendon, je miro de la kontrolistoj. Foje ili rimarkas spegulon super la pesilo.

– Pro kio vi pendigis tie spegulon?

– Ho, vi ne konas la virinojn! Ĉu vi pensas, ke ili rigardas la pesilon anstataŭ la spegulon?

Sekaj fontoj

Profesoro longe-longe klarigas, citaĵoj pelas unu la aliajn.

– Nu, kolegoj – poste li demandas –, kiel plaĉis mia prelego?

– Se diri sincere – hezitas la respondanto –, ĝi estis iom-iom seka, malgraŭ la multaj fontoj...

Akuzo de l'kuzo

– Kial vi tiom maltrankvilas, Miĉjo?

– Pro nia nova direktoro...

– Jam nun? Kiam ni ankoraŭ ne konas lin?

– Bedaŭrinde ne! Sed tutcerte li ne estos mia onklo.

Rilatoj, oj!

Fraŭlino prezentas sin ĉe la personarĉefo, kaj milde aŭskultas liajn demandojn pri la antaŭaj postenoj.

– Kaj kiaj estis viaj rilatoj tie kun la kolegoj, fraŭlino?

– Bonegajn rilatojn mi havis, precipe kun mia ĉefo... sed tion oni ne kutimas mencii, ĉu ne, en la laboratesto...

Plezuroj, oj!

La direktisto de la orkestro forte grumblas dum la provludo kontraŭ la violonĉelistino:

– Karega fraŭlino, inter viaj gamboj tian instrumenton vi havas, kiu donus al ni plezuregojn. Sed kion faras? Vi nur gratadas sur ĝi tien-reen!

Pli poste

Ŝi, estanta jam en la sesa monato, vizitis aŭguristinon. Tiu miksas kaj metadas la kartojn tien-reen, finfine ekvoĉas:

– Vi certe akiris belan sinjoron, kiu tre interesiĝas pri vi, fraŭlino...

– Ho jes – ŝi interrompas la aŭguristinon –, tio okazis antaŭ ses monatoj. Sed mi volas scii, kie nun troviĝas tiun impertinenta bubo?

Pli frue

– Panjo – diras la etulinjo –, mi volas edziniĝi.

– Kun kiu, mia Lolinjo?

– Kun mia avo!

– Sed tio ne eblas, Lolinjo, li estas mia patro.

– Kial ne eblas? Ankaŭ vj iĝis la edzino de mia paĉjo!

Io alia!

La unua infano naskiĝinta en retorto jam eniris la unuan klason lernejan. Li ĉirkaŭrigardis la viglegajn infanojn, kaj orgojle li eligis:

– Sciu geknaboj, ke miaj gepatroj estas ja bonkondutaj personoj. Ili ne luktadas en la lito kiel la viaj!

Religiaj pensoj

– Depost mia edziĝo al Roza, mi iĝis bedaŭrinde religiema!

– Strange, amiko. Sed kial?

– Mi jam kredas pri la infero.

Ĉu edzojn?

– Ĉu vi scias, kion mi deziras je mia naskiĝtago? – demandas la edzino. – Ke mi havu finfine bonan edzon, ne vagantan nokte inter la drinkejoj!

– Mia dio! – hororas la edzo. – Kaj kion vi faros kun du

edzoj?

Ervin *Fenyvesi*

Kvin titolojn...

el la verkaro de István Nemere ni kaŝis en la ĉefliniojn de nia enigmo (H.1., H.11., H.34., H.57. kaj V.1. — ensendendaj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la apero.

HORIZONTALE: 1. Titolo de romano, 11. Romantitolo, 13. Kunfiksi per ymatelhoketo, 14. Reen: verba finaĵo, 15. Kontentigi soifon (R), 16. Supra membro de homo, 17. ...-oro: ne valormetalo, sed valora ardo por io, 19. Virina nomo, 20. Movi la langon sur io, 21. Prostituejo (R), 23. Interpunkcia signo (R), 24. Duono de paliso(!), 25. Tre fortan, 27. Norda Prismo, 28. Persona pronomo, 29. Esti lokita'ie, 30. Ventolado, 32. Ne homa, 34. „Libro de la jaro en 1985", 35. Speco de hundo (R), 36. Ĉe kiu mankas pigmento en la haŭto, 37. Koncerna komencon de batalo, 38. Sufikso, 39. Prefikso, 41. Beletra versa letero, 43. „Malnova" prefikso, 44. Sin movi, 46. ...-a nombro de benzino (gravas por eksplodmotoroj), 47. Turnebla tubfinaĵo, elfluejo (R), 48. Regula alterno (R), 50. Reen: speco de papago, 51. Deflankiĝi de la ĝusta vojo, 52. Hungaria minista urbo (Dorog), 54. Artikolo, 55. Svisa pioniro de Esperanto, verkisto, 56. Oleodona frukto (R), 57.

VERTIKALE: 1. Titolo de romano, 2. Ataki la unua, 3. Riza alkoholaĵo, 4. Kovri per lako, 5. Reen: multe da fojoj (R), 6. Reen: tabelvorto, 7. Firme certigi, 8. Gitarfadene, 9. Voto!, 10. Valora metalo, 11. Delikata teksaĵo (R), 12. Finaĵon de fingroj, 17. Traktejo de publikaj aferoj, 18. Rilata al plantoj, vegetaĵoj, 21. Scienco pri plantoj, 22. La granda ŝtono, 25. Vira nomo, 26. Tute senvesta, 29. Reen: mezo de Sebastopolo, 30. Virina nomo, 31. Reen: unuo de elektra rezistanc', 33. Rimed', 37. Reen: produktata, 38. Vulkana montar' en Armenujo, 40. Kantbirdo (R), 42. Brutloĝeja, 43. Opinii konforme al la vero, 45. Malofta metal' (kemia simbolo: Y), 47. Puninda ag', 49. Transigi al alia loko (R), 51. ERR, 53. Samspecaj de golo, 55. Ekpeto!

I.Z.



Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1986/5:

Deklaru: tie prosper' en futuro
Estas nur por kreanto, laborulo!

(Gy. Juhász: Al la fronto de laboristhejmo. — Trad. M. Fejes)

Premion gajnis per lotumado: Wolf Krüger, Eisenhüttenstadt, GDR; Jakub Šamšiev, Samarkando, Uzbekistano, SU; Veszprémi Tibor, Kecskemét, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

* * *

Dum enpaĝigo la krucenigmo „*Esperanto-revuo*" en la n-ro 1987/2 suferis malagrablajn mankojn. Ni petas pardonon de niaj solvantoj! Kompreneble ni fiksas *novan limdaton:* unu monato post la alveno de tiu ĉi numero! Bonvolu do korekti laŭ la sekvaj. *HORIZONTALE:* 47. Legu 48! *VERTIKALE:* 49. -io: kapablo fari laboron, 51. Forte premus perpiede, 52. Ridindiga moko (R), 54. -io, genro de fokoj, 56. Platboato, trafikanta inter du bordoj (R), 58. Kora inklino, 60. Prepozicio, 63. Galiumo.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes
MARIAGNES
de Lorjak

La plej nova romano de la famekonata aŭtoro — samkiel liaj aliaj verkoj — promesas bonan amuzon.

1. En kiuj jaroj loĝis Lenin en la sama Pariza domo, kie la protagonistino?
2. Kio estas „La tamburo de Waterloo"?
3. Kion signifas la volapuklingva citaĵo, diro de saĝulo Varlecaro?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo. La verko de la sekva ekzameno: 1987/4: Baza Legolibro por Komencantoj.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1986/5:

1. Inĝ. Nogradi havis la baptonomon Valter.
2. La hundo de Peter nomiĝas Raf.
3. La demanditan frazon pri la eksgeedziga proceso skribis Izabella al sia edzo, Valter Nogradi.

* * *

Premion gajnis per lotumado: Anna *Dvořáková*, Tvrdošin, CS; Edith *Plümecke*, Magdeburg, GDR.

Leterkesto

Jiří KAREN, Prago, CS: Ne malgrandan plezuron donis al ni la gratulinda informo, ke aperis via nova poemlibro – jam la 8a! – ĉeĥlingve. Espereble ni vidos denove ankaŭ E-ajn poemojn de vi, ĉiam inspirplene verkitajn. Kontentigas niajn kunlaborantojn, ke ankaŭ vi – samkiel pluraj aliaj – ne hezitis skribi pri via plaĉo (Tertremoj, Reokupo de Buda, daŭrigindaj rakontoj de Sz. Bálint, k.a.) koncerne artikolojn en diversaj n-roj de HV.

Eŭgeno PEREVERTAJLO, Taŝkento, Uzbekio SU: Via ideo: ligi kontaktojn inter abstinulaj organizoj pere de esperantistoj, por helpi ties ne tro facilan agadon interŝanĝante materialojn kaj spertojn – ŝajnas tre rekomendinda. Sen longa pripensado ĉiu ajn povas tuj rimarki la komunajn interesojn kaj la eblojn inter nia humana movado kaj la bravaj abstinulaj organizoj. Ni forte esperas, ke esperantistoj en diversaj landoj volonte intervenos por la batalo kontraŭ alkohol- kaj nikotin-trouzado.

Poul THORSEN, Kopenhago, DK: Akceptu koran dankon pro la ricevita gazetpaĝo de „Politiken", grava dana ĵurnalo, kies ampleksa artikolo kun grandaj fotoj varme prezentas la familion Polgár, Susanan kaj la du fratinojn kun grandioza ŝaktalento, okaze de ŝakturniro en la dana ĉefurbo. La ĵurnalisto admiris ilian lingvan talenton, kompreneble ankaŭ tion, ke la monde elstaraj fratinoj estas esperantistoj.

Korespondi deziras

Gruianu *Petre (31) fraŭlo, precipe kun gejunuloj el CS, SU kaj H, pri div. temoj. E-movado, interŝ. E-revuojn. Resp. garantiata.* Buzau *B-dul Uniru 24/B ap.24. R-05100.* – *Studentino Elina* Lunjova *(21) ktm, pĉt. nepre resp.* Saratov, *do vostreb. SU-410.054.* – Salov *Vadim (31) laboranto, pri kemio, E-movado, sporto.* Dzerĵinsko, *str. Pravda 22, kv. 615. Sovetio.* – *Oficistino Zdravka* Dobreva *(42) ne-edziniĝinta, ankaŭ F, A, G, R lingve.* Sofia, *K.Aprilski 10/B, BG-1303.* – *Kontistino Cveta T.* Vasileva *(40) pri kino, geografio k.a.* Plovdiv *ĵk. Trakia 151/G ap.7. Bulgario.* – *Krzysztof* Dobersztyn *(24) pri pm, turismo, ĉevaloj k.a.* Damaslawek *Grunwaldzka 15. PL-62-110.* – *Jaroslaw* Sulski *(21) pri literaturo, rokkmuziko, filmo k.a.* Grudziadz, *str. Riaskowa 1/1, PL-86-300.* – *Sergeo Zapotocni ktm pri lingvoj, fotado, kol. bk, pm, moneroj, libroj.* Nikolajev *Dmitrijeva 21-5. SU-327.-002.* – *Kurt* Nobet *(58) pensiulo pri sociaj temoj, ĝardenkulturo, fotado, hundo-tenado, kol. pm.* Blumberg *Mittelweg 20. DDR-1291.* – *S-ro* Les *Lo (26) ĉina fotoamatoro kun leteramikoj, vialandan fotogazeton reciprokos per ĉinaj E-aĵoj aŭ aliaj.* Neijiang *(Siĉuan prov.) Neijiang Construction Bank, P.R. Ĉinio.*

Ekonomikistino Krystyna Kwiatkowska – *havas 3-jarajn ĝemelajn nepinojn – krom div. temoj* ankaŭ pri infanoj, *ktm.* Gliwice Plac Rzeczniczy 1/12. PL-44-100. – Jolanta *Žirgutytė* (20) ktm, pĉt, *Kaunas.* str. Partizany 162-42. Litovio, SU-234.300. – Kudristino Marija *Penčeva* (38) pri popolkutimoj, vojaĝoj, literaturo, ktm. *Plovdiv* St. Malgara 2a, BG-4004. – Stanislaw *Zalewski* (34), int. geografio, historio, literaturo, arkitekturo, artoj, velado, jun.muziko, kol. libroj, bk, diskoj, k.a. *Czechowice-Dziedzice,* ul. Trangutta 24/101. PL-43-322. – Katarzyna *Szczyrbula* (29) studentino de pentrarto, ktm. *Wroclaw,* skr. poczt. 2086. PL-50-966. – Bibliotekistino Maria *Strzegowska* (29) pri turismo, literaturo, belartoj, lingvistiko. *Leba,* str. Olszewskiego 1. PL-84-360. – F-ino Eglei *Zilinskaitei* (22) ktm, pĉt. *Kapsukas,* str. Pušinio 50-39. Litovio SU-234.520. – F-ino zita *Antanaitytė* (20) ktm, pri div. temoj. *Šlienava,* str. Šviesioji 7. Litovio SU-234.313. – F-ino Rasinai *Beliunaitei* (22) ktm, pĉt. *Kapsukas,* str. Z. Angariečio 44-15. SU-234.520.

Membroj de E-klubo Nigramar-ondo, *Gelendĵik,* a/k 30, SU-353.470: Zinaida *Ananjeva* (30) kol. numismatiko, kalendaretoj, – Vladimir *Samolĵvalov* (26) komput. el. mekanikisto, pri rokkmuziko. – Mihail *Ĉulkin* (31) agrokulturisto pĉt. – Anna D. Solovjeva (44) instruistino de kemio, pĉt. – Valentina Iv. *Uglova* (67) pri edukado de nepoj, kuirreceptoj. – Marija Iv. *Bezborodova* (56) pri muziko, literaturo, jogo. – Galina *Efimova* (24) pentristino, pĉt. – Olga Vl. *Uglova* (41) angla tradukistino, pri muziko, literaturo. – Alla Ev. *Korneva* (54) pri literaturo, kuirreceptoj. – Svetlana *Kosolapova* (22) ŝu-modelistino, kol. florbildoj, kuirreceptoj, – Vladimir *Kosolapov* (34) informinĝeniero, klubprez. pri turismo, E-movado, ankaŭ kun E-Kluboj. – Foto-konkurso „Esp. aranĝoj" atendas almenaŭ 18x13 cm fotojn por ekspozicio, ĝis novembro. E-Klubo, *Staszow,* Parkowa 6. PL-28-200. – S-ro Venislov *Baltrus* (32) ktm. pĉt. filatelio, nudfotoj. *Joniskelis,* Hospitalo. Litovio SU-235.240. – Studentinoj (19) pĉt. turismo, literaturo, i.ŝ. bk, E-aĵoj, Adr.: Jolita *Sakalauskaitė, Narteikiai,* Joniškelio TŪT 10-17. Litovio SU-235.245. – Membroj E-Klubo (17-37) de Amikeco en Gorkij-regiono, kun E-kluboj kaj s-anoj. *Dzerĵinsko,* str. Gajdara 49. SU-606.026. Membroj de E-Klubo Tondro en Litovia urbo, ktm. pĉt. *Jonava,* a/d 7, SU-235.000. –

Ĵus aperis!

Nevena Nedelĉeva: DUM NOKTA DEĴORO (Originalaj noveloj) 87 p. Prezo: 12,- ned. gld.

Julian Modest: MISTERA LUMO (Originalaj noveloj) 91 p. Prezo: 12,- ned. gld.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Por Hungario: 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1368) * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.

FABRIKO DE ELEKTROIZOLAĴOJ KAJ PLASTO

La Fabriko de Elektroizolaĵoj kaj Plasto liveras teknike altkvalitajn plastajn peĉojn – duonpretajn kaj pretajn produktojn – al la elektra, veturila, mebla kaj konstrua industrioj. La entrepreno, nun festinta la centenarion de sia fondiĝo antaŭ kvar jaroj, organizas kaj direktas la laboron de tri – grandparte memstaraj – fabrikoj.



Niaj ĉefaj produktoj:

Je varmo ŝrumpantaj plastaj tuboj „KONTRAKTEN"
Polipropilenaj kaj durgumaj akumulatorujoj
Plastaj tubetoj por elektraj dratoj, kaj aliaj artikloj por elektra muntado
Produktaĵoj bakelitaj kaj moliĝantaj je varmo

Budapest XI., Fehérvári út 120. 1116

Fondojaro: 1883.

ĈE LA OKCIDENTA PORDO DE HUNGARIO KORE SALUTAS KAJ BONVENIGAS VIN LA DOMMASTRO DE LA DEPARTEMENTO GYŐR-SOPRON:

ciklámen tourist

BELEGAJ MALNOVAJ ARKITEKTURAJ KREAĴOJ. UNIKAJ NATURBELAĴOJ. FAMA GASTRONOMIO.









VIZITU NIN, ESTU NIA GASTO!



Ĉi la sekvaj numeroj de „HUNGARA VIVO" Vi povos ĉerpi pli detalajn informojn pri la vidindaĵoj de nia departemento. Petu nian Esperantlingvan prospekton ce la sekva adreso:

CIKLAMEN TOURIST
H-9023 GYŐR, JÓKAI U. 12.
☎ 36/96-16-050
Tx: 24-616

1987 JUL 0 8.